# Kajeroj el la Sudo

*BULTENO DE **H**ISPANA **A**SOCIO DE **L**ABORISTOJ **E**SPERANTISTAJ (HALE)*

http://www.mur.hnet.es/uphm/jesuo/k35.htm | http://www.dragonfire.net/~Esperanto/k35.htm



# Mortis don Francisco Zaragoza




**Nº 35** **Julio/Septembro 1997**

# Kajeroj el la Sudo

**BULTENO DE HISPANA ASOCIO DE LABORISTOJ ESPERANTISTAJ (HALE)**



*Prezidanto:* ***Martín Bustín Benito.***
*Apartado de Correos 4143,*
*ES03080 ALICANTE*

*Vicprezidanto:* ***María del Mar Guirao Gallego,***
*Avd^a^ Juan Carlos I, 22-8º-H,*
*30800 LORCA (Murcia).*

*Kasisto:* ***José María Bernabéu Franco,***
*Gral. Primo de Rivera, 8.*
*E-03360 Callosa de Segura,*
*ALICANTE (Hispanio).*

*Sekretario:* ***José Pina Tuells,***
*c/ St^a^ Teresa, 22-2º CD,*
*ES30005 MURCIA.*

*Libroservo:* ***Nicolás Gil Carballo,***
*Apartado 305,*
*ES24080 LEÓN.*

*Redaktoro:* ***Jesuo de las Heras,***
*Apartado 4461*
*ES30080 MURCIA..*


**Kovrilo**: elstara esperantisto don Francisco Zaragoza Ruiz, kreinto de la *Perfraza Metodo de Esperanto,* mortis!

## Enhavo


*Redaktore* ............................................... 3
*Informoj el la prezidanto* ......................... 4
***Reagoj***: ....................................................
*Senlaboreco kaj deĵordaŭro* .................. 5
*Ĉu esperantista aŭ esperantano?* ........ 12
*Ĉu hispana, aŭ kastila?* ........................ 34
***Gramatiko:***
- *Solvo por la participa problemo,* ..... 11
- *La kazo post elmigri kaj aliaj* ........... 15
- *Erara uzo de la akuzativo.* .............. 15
- *Ĥo, kia co!* ....................................... 33

***Socio kaj laboro:***
- *Mondunuiĝo* .................................... 10
- *KFD* ................................................... 14
- *Letero de KAE* ................................. 14
- *Uea delenda est!* ............................. 17
- *Laboristoj privilegiitaj:* ..................... 21
- *Nekrologo* ........................................ 23
- *Socia problemo en nia asocio* ......... 24
- *Iniciatoj kontraŭ la sendungeco* ...... 25
- *Defendo de liberoj* ........................... 31
- *Novaj leaoj* ....................................... 32

***Kulturo:*** *Emo al verko* .......................... 9
*Ĉiam sonante* ....................................... 16
*El nia Libroservo* ................................. 18
*He, amiko, ci legi ĉi tie!* ......................... 19
*Vane* ..................................................... 22
*Pri la strukturo de la homa korpo* ......... 24
*Kio estas vegetarismo?* ........................ 28
*La tajforegno de Murcia* ........................ 35


Oni **povas reprodukti** artikolojn, kondiĉe ke oni **citu la originon.**

*Monsendo de kotizoj kaj abonoj al la* ***nova konto*** *nº* ***1302 0412 86 0022655110*** *en libreta de Caja Postal. Sen aldona kosto.* La abono kostas 1000 pesetojn. Kvintancon oni ricevos.


*Pretigas la Kajeron:*
*Provkorekto:* **José Pina Tuells,**
*Administro:* **Juan Antonio Cabezos Martínez,**
*Redakto:* **Jesús de las Heras Jiménez**


*Ni ne korespondos pri nepetitaj artikoloj. Tamen, ni klopodos publikigi ĉiun artikolon kies enhavo estas interesa kaj ne mistraktas iun ajn personon.*

*Pri la enhavo de la artikoloj respondecas la aŭtoroj mem, ne la redakcio.*

# Redaktore:

Jen novan numeron de nia revuo! Ĉi foje ni enhavas du novajn subskribojn: Gbeglo Koffi kaj Ángela Soriano. Ni bonvenigu ilin, kaj esperu, ke ili kutime verku por nia magazino. Ankaŭ ni retrovas Isabel-n Acevedon, kies kutime interesan artikolon vi trovos en paĝo 33.

## Asembleo Ĝenerala

Laŭ ordo de la Kamarada Prezidanto de HALE, ni alvokas al **Asembleo Ĝenerala** en Valensjo, *Sala de Juntas* de la Fakultato Pri Ekonomio, Avdª Blasco Ibáñez, 30, la 8an de julio je la 9-a horo, laŭ la sekvanta

## Tagordo

1 Legado kaj eventuala aprobo de la akto de la antaŭa Asembleo.
2 Legado kaj eventuala aprobo de la jara bilanco.
3 Informoj pri la aktivado de la Asocio.
4 Informoj pri nia organo ***Kajeroj el la Sudo***.
5 Kotizoj.
6 Programo por la venonta periodo: agado ĉe sindikatoj, rilatoj kun SAT, kun LEA-komitato, kun LEA-oj, ktp.
7 Situacio kaj uzado de la havaĵo de HALE.
8 Elekto de nova prezidanto.
9 Debato kaj baloto pri la *Proponoj de la Sekretario* ĉe paĝo 36.
10 Petoj, demandoj kaj proponoj.

**Mursjo, la 24an de majo de 1997.**

**La Sekretario,**

*José Pina Tuells*

Nin ĉagrenas, ke la de multoj amata majstro, S-ro Francisco Zaragoza Ruiz, mortis en sia hejmo de Callosa del Segura, pro longa malsano. Kamarado José María Bernabéu rakontas al ni pri li je la paĝo 23.


Ne mankas artikoloj en nia revuo ĉi foje! Dudek sep entute, kaj ne malpli ol 10 rilatas al socio kaj laboro, temo pri kiu nia asocio devas ĉefe prizorgi, laŭ kelkaj samideanoj. Ankaŭ ne mankas mia promesita artikolo pri mia *ueaeco* ka *nesataneco*, kiun vi povas legi je paĝo 17. Mankis tie la evidenta argumento, ke estante SAT *sen*nacia, la estraro estas ja ununacia! Kial ne povas esti brito, latvo, ruso aŭ brazilano en la estraro de SAT? Ĉu funkciulismo ankaŭ regas SAT?

Kaj grava problemo ankaŭ estas, ke HALEanoj ne legas multe en Esperanto, kiel asertas Nikolao Ŝil en paĝo 18. Nia libroservo posedas multajn librojn nevenditajn kiuj rilatas al liberecanismo kaj laborismo, inter ili la tuta verkaro de Lanti, plej leginda.

Jurgo Alcaser, Maite Alcalá kaj Pablo Ruiz rakontas interesajn aferojn pri ekspkluatado kaj postenoj de laboristoj. Gbeglo Koffi verkis interesan artikolon pri vortoj *esperantisto* kaj *esperantano*. Kompletas la ***Kajeron*** amuzaj artikoloj, kiuj mi esperas, ke vi aprobas. Mi esperas, ke vi ĝuos la numeron, kaj ke ni kunvenos en Valensjo kaj ni analizos kaj pridiskutos ĉiujn debatindajn temojn spekulitajn en niaj paĝoj. Ĝis baldaŭ!



# *INFORMOJ DE LA PREZIDANTO*



Ĉi-jare la Asembleo de nia Asocio okazos en la urbo Valencio inter la 8-a, kaj la 13-a de la venonta julia monato.

Inter la 9 punktoj de la proponita tagordo, kiuj estas interesaj por la regula vivo de H.A.L.E. mi deziras rimarkigi la punkton 6: *Programo por la venonta periodo: Agado ĉe sindikatoj, rilatoj kun S.A.T., kun L.E.A Komitato, kun L.E.A -oj, ktp* ĉar ĝi enhavas, laŭ mi, la plej gravajn temojn rilate la rolon de LEA-oj por atingi la statutajn celojn de nia Asocio, kaj de S.A.T.

La agado ĉe la sindikatoj estas preskaŭ nula, ĉar, laŭ mia scio, nur du kursoj pri la Internacia Lingvo estas starigitaj, kaj ambaŭ fiaskis antaŭ sia fino. Mi opinias ke ni ne sufiĉe propagandas en tiuj laboristaj medioj kie eblos varbi aliĝontoj al H.A.L.E., kaj S.A.T.

Pri la rilatoj kun S.A.T., L.E.A. Komitato de S.A.T. kaj L.E.A.-oj: Nia L.E.A-o H.A.L.E. havas normalajn rilatojn kun S.A.T. malgraŭ ke ne ĉiuj H.A.L.E-anoj estas S.A.T-anoj, kio sendube malfaciligas plej intensajn rilatojn kun ĝi.

L.E.A.Komitato ne funkcias laŭ la statutaj reguloj, ĉar *L.E.A. Komitato konsistas el po du reprezentantoj elektitaj de la P.K. de S.A.T., kaj du de ĉiu L.E.A.-o.* Tiu ĉi kondiĉo ne realiĝis, kaj praktike estas nur unu membro de la P.K. de S.A.T. kiu estas la sekretario de L.E.A. Komitato kun kiu nia Asocio havas maloftajn rilatojn.

La rilatoj kun la aliaj L.E.A-oj estis preskaŭ nulaj pro manko de kunlaboro.Nun dank' al la iniciato de la kamaradoj Alan Gould kaj Ron Lynn el Britio, kiuj kreis "L.E.A-LIGILO"n eblas interrilatiĝi, kaj havi intersanĝojn inter la L.E.A-oj, kaj informojn utilajn pri la vivo de la diversaj laboristaj asocioj ligitaj al S.A.T.

Nun ke la estraro de nia Asocio kompletiĝis ni klopodos partopreni en la aferoj koncernantaj al H.A.L.E., kaj S.A.T.

Kun amikaj salutoj.

*Marteno.*

# Reagoj

## *SENLABORECO KAJ DEĴORDAŬRO*

### *Kritikaj rimarkoj pri* La mallongigo de la deĵordaŭroj[1]

*Jurgo Alkasaro*

La unuagrada, naiva reago de la laboristo antaŭ la pligrandiĝo de la senlaboreco estas simpla, logika kaj rajtoplena: li deziras labori, deziras laborpostenon, deziras pluvivi. Ĉe socio baziĝanta sur la ekspluatado tiu ekspluatato, kiun neniu ekspluatas, fariĝas rubaĵo. Tial la laboristo volas, petas, postulas esti ekspluatata.

La sinteno de la sindikatoj, t.e. de la organoj administrantaj la laboran forton, estas neniam timigi la bazon de la nuna socio, ĉar ataki ĝin signifas ankaŭ ataki la bazon de la sindikatismo. Tial fundamente estas, ke la laboristo restu laboristo, pli bone aŭ pli malbone pagata, sed laboristo. Tiel laŭ la marksistoj la laborista stato fariĝis eĉ porfiereca grundo. Tiu vidpunkto estas la propra al la laborsocio, la laboristo faras aŭ malfaras (pli ĝuste: nek faras nek malfaras) nur kiel laboristo, sen havi la plej minimuman perspektivon lasi esti laboristo krom la revon fariĝi mastro.

Tiuj, kiuj deziras surpasi la nivelon de la naiva protesto (tiun de la bruligo de maŝinaroj) kaj klopodas trovi solvon al la problemo, kontraŭe, bezonas pripensi ĝin pli kritike. Nepras sin demandi: el kie devenas la problemo? Ĉu ĝi estas solvebla? Se jes, sub kiaj kondiĉoj? Kvankam la respondoj al tiuj demandoj povas esti pluraj kaj tre malsimilaj, kvankam la respondoj povus esti nekontentigaj, nesufiĉaj aŭ eĉ ŝokaj, la demandoj estas neeviteblaj.

Kiam oni pretendas alporti teorie peritan respondon, kiu permesus superi la respondojn partajn (12,1) de la sindikatismo, kaj kritiki ilin, ĉar ĝi neniam alfrontas la strukturajn kernojn de la okcidenta ekonomio (12,1), la starigado de tiuj demandoj estas, krom neeviteblaj, postuleblaj. Tamen la citita artikolo lasas nin malsataj pri tio. Aliflanke estas mirinde, ke oni pretendas, sin apogante sur Marx —tiu, kiu asertis, ke la laborista klaso devas memdissolvi kiel klaso—, konsideri meriton la *publikan bildon*, kiun donas la sindikatisma politiko serĉi ekspluatanton, t.e. plifortigi la blindecon de la laboristoj.

Tiel do, rilate al la citita artikolo, ni troviĝas antaŭ propono pri administrado de la senlaboreco kaj de la laborpostenoj, ne antaŭ analizo pri la problemo de la senlaboreco. Ni ne scias kiel nek kial aperas la problemo, kio probable estas nepra kondiĉo por proponi solvon al ĝi —se tiu ekzistas. La afero, kiu ĝenas la verkintinojn, ŝajnas esti la sama, kiu ĝenas la ŝtaton, la entreprenistojn kaj la sindikatojn: estas amaso de senlaboruloj, kaj oni ne scias, kion fari pri ili.

#### La arto misciti Marx-on

Mirindas, ke la artikolo komencas per du citaĵoj de la sinjoro Marx. Mi deziras profiti la okazon por montri, kiel oni kutimas mistifi la marksan verkon ĉe nia maldekstra medio:

a) **konfuzigo de la marksaj konceptoj pri la laboro**: oni citas Marx-n (*junan*[2] kaj *maljunan*, 11,1), por ke li diru al ni, ke la *homa laboro* (kreanta agado, simbiozo kun la naturo) estas kunsubstanca kun la homo. Poste la

verkintinoj asertas, ke nepras repensi la aferon laboran (11,1), t.e. la *salajratan laboron,* el la klasikuloj (mi legas: Marx) kaj, sen diferencigi, ili priparolas la neceson kaj la rajton pri la *salajrata laboro*. Tio estas, ili dirigas Marx-on la kontraŭon de tio, kion li diris.

b) **konfuzigo inter la konceptoj marksa kaj marksista pri la laboro**: sekvante la marksistan kaj sindikatisman tradicion, oni parolas al ni pri **salajrata laboro** kiel ia neforlasebla rajto de la laboristo, kaj oni parolas nin eĉ pri tiuj, kiuj ankoraŭ ĝuas laboron (12,1). Memkompreneble oni rajtas defendi tiun hipotezan rajton (mi mem estas senlaborulo kaj scias pri la salajrobezono kaj pri mia neforlasebla rajto pluvivi), tamen antaŭ ol fari tion, oni devas **rompi** kun Marx. Kiel oni povas alvoki Marx-n kaj poste defendi laboran koncepton tutkontraŭantan la marksan? Kie restas la marksa kritiko al la memfremdiĝanta laboro? Oni faras, ke la standardoportanto de la **abolo de la salajrata laboro** defendu ian rajton al la salajrata laboro.

c) **konfuzigo de la koncepto pri laboro-varo**: Oni difinas la laboron kiel varon survoje al elĉerpigo (11,2). Sen bezono esti leginta Marx-n —kiel la plimulto el la marksistoj—, ĉiuj scias, ke Marx asertis, ke la *homa laboro*, la *laborforto* de la laboristo, ĉe la kapitalisma socia formacio fariĝas varo, kaj ke tio estas la ŝlosilo de lia kritiko. Nun ni eltrovas, ke la laboro (*laborforto*) jam ne estas la varo, kiun la laboristo portas al la merkato, serĉante aĉetanton (kiel kredis kompatinda Marx), sed ke la laboro (laborposteno) estas la varo, kiun la laboristo aĉetas al la burĝo. Mi kredas, ke se oni parolas pri la laboro fariĝinta varo laŭ senco malsimila al la marksa post citi Marx-n, oni devas ekspliciti tion. Oni rajtas elpensi teoriojn, oni rajtas eĉ ne teoriigi kaj verki per ĉiutagaj vortoj pri la laboro-varo, tamen oni ne rajtas krei plian konfuzon miksante teoriajn konceptojn (pli malpli cititajn) kaj ĉiutagajn esprimojn, kiuj havas la saman lingvan formon.[3]

Tiu ĉi estas la vojo per kiu oni kutimas mistifi la marksan verkon, ĉu vole, ĉu nevole. Mi kredas, ke jam estas horo, por ke ni findecidu, ĉu pristudi serioze kaj ĝisfunde la marksan verkon, aŭ lasi, ke Marx ripozu pace. Intelekta konfuziĝo estas ĝuste tio, el kio la laborista klaso malpli mankata estas.

## La senlaboreco

La ĉefa karakterizo de nia socio estas, ke ĝi baziĝas sur la laboro (salajrata), t.e. sur la produktado de ekonomiaj profitoj, kiuj strukturnepre konkretiĝas al *kapitalamasigo*. Iu el la ĉefaj enaj kontraŭdiroj de tiu ĉi socio estas, ke la ekonomia sistemo subtenanta ĝin povas postvivi nur pere de senĉesa plikreskado, kaj tamen tiu senĉesa plikreskado disvolviĝas ĉe finita mondo. Tial tiu kreskado devas mildiĝi kaj fine halti. Praktike tio montriĝas per tio, ke ni produktas pli ol tio, kion la merkato taŭgas ensorbi, kaj ke ni tamen ne kapablas produkti ĉion, kion ni bezonas por konsumi, por satigi niajn bezonojn, kaj kion ni laŭ teknika kapablo povus produkti. Alivorte: ke la bezonoj de la anoj de la merkata socio estas en kontraŭdiro kun la bezonoj (kondiĉoj por la funkciado) de la merkato, montras ne nur la neraciecon de la kapitalismo, sed ankaŭ ties nekapablon funkcii laŭ ties propraj reguloj.

Kiam la merkato saturiĝas, la profito ne povas esti atingita per pligrandigo de la produktado (pro tre simpla kialo: manko de aĉetantoj), sed per la pligrandigo de la *eksplutadkvanto* de la salajrata laboro. Tio eblas pere de la teknologia disvolviĝo:

produkti pli dum malpli da tempo, kaj tiel malmulte-kostigi (malpliigi ties *valoron*) la vivrimedojn de la laboristoj[4]. Tamen produkti pli dum malpli da tempo, kiam la merkato ne estas plivastigebla, signifas malpliigi la nombron da laboristoj. Tiu estas la kialo, pro kiu la sendungeco kreskas senĉese[5].

Tiel do la plikreskado de la senlaboreco estas manifestiĝo de la tendenco inherenta al la kapitalismo pligrandigi la riĉecon samgrade kiel la mizeron. La maldekstraj teoriistoj (aparte la marksistoj) devas pristudi serioze tiun problemaron kaj, anstataŭ serĉi magiajn solvojn kaj pligrandigi la iluziojn de la laboristoj, montri al ili kiel *plusvaloro*, salajrata laboro kaj senlaboreco estas nedisigeblaj.

## Mallongigo de la deĵordaŭro

La mallongigo de la deĵordaŭro estas bona kaj grava celo: la vivo estas tro interesa por malŝpari la tempon per meĥanika kaj fremdiganta laboro. Kiom malpli da horoj oni estas katenita al la sanktega laborposteno, tiom pli da tempo oni havas por efektivigi kreantan laboron (almenaŭ tiuj, kiuj kapablas). Malpliigi la deĵordaŭron (paŝo sur la vojo al la abolo de la salajrata laboro) devus esti centra agitvorto, kvankam estus eĉ ne unu sola senlaborulo tra la tuta mondo. Nu, ĉe la sindikata medio tiu ĉi agitvorto aperas nur (kaj nur sporade) kiel respondo al la plivastiĝo de la senlaboreco. Estas tiel, do, kiel mi pritraktos ĝin.

La mallongigon de la deĵordaŭron oni proponas **kiel solvon,** por ke estu laboro por ĉiuj: (...), ĝi estos la plej efika kaj *simpla* ilo por alfronti la iompostioman malabundiĝon de la laborpostenoj (14,1). Trudo de malpliigita deĵordaŭro flanke de la laboristoj kunportus nur —estu kia estu la rezistogrado, per kiu kontraŭstarus ĝin la mastraro— pli grandan streĉon ĉe la teknologia kampo, pli grandan aŭtomatiĝon de la produktado cele garantii la *honestan* profiton de la kapitalo. Tiun strebon (samkiel ĉiuj la teknologiajn strebadojn ĝis nun konatajn) povus efektivigi nur la plej potencaj entreprenoj, tio pliigus la *kapitalkoncentriĝon* kaj la *potencon de la laborfortoj*, alivorte: novan plivastiĝon de la senlaboreco. Per si mem tiu procezo estas bona; estas bone, ke la produktado aŭtomatiĝu pli kaj pli, kaj ke malpliiĝu la homa korpa laboro postulata de la produktado. Tamen ĝi ne solvas la senlaborecproblemon ene de la kadro de la produktado celanta profiton. Ene de tiu ĉi kadro ĉiu akcelado de la teknologia renoviĝo kunportas pliiĝon de la senlaboreco kaj de la mizero. Tiel, la mallongiĝo de la deĵordaŭro **konsidera-ta kiel solvo al la senlaborecproblemo** fariĝas memkontraŭdira.

La *naiva* propono lukti por la malpliigo de la deĵordaŭro kreas iluziojn, kiuj malebligas la konsciiĝon pri la aŭtentika problemo.

## *Socia salajro*

La dua solvo ne preterpasas la nivelon de ia ĝeneraliĝado de la sendunga subvencio, eble ia formo de publika bonfarado pli *liberala* aŭ pli konforma al merkata ekonomio. Rilate ties solvantajn ecojn oni povas diri preskaŭ la samon jam diritan pri la mallongigo de la deĵordaŭro. Tamen mi deziras substreki iun trajton de tiu propono: ties financado pere de speciala imposto al la informadikumado (15,1). Okulfrapas la paralelismo inter tiu speciala imposto kaj la detruado de maŝinoj dum la unuaj tempoj de la kapitalismo. Ĉu eble ne estus pli *progresema* surimposti la pli malnoviĝintajn industribranĉojn, kiuj ankoraŭ malŝparas homan laboron, cele devigi ilin ĝisdatiĝi, anstataŭ malhelpi tiujn branĉojn, kiuj tagon post tago plisuperfluigas la homan korpan laboron? Ĉu eble pravas, ke la laborista

movado kapablas sin proponi **proprajn** celojn?

## Uz- kaj ŝanĝvaloroj

Neniu aĵo povas havi *ŝanĝvaloron*, se ĝi ne estas samtempe *uzvaloro* (kontraŭe kiu aĉetus ĝin?), aliflanke tio karakterizanta la burĝan socion estas la fakto, ke tendence ĉiu *uzvaloro* fariĝas *ŝanĝvaloro*. Laŭ Marx la *uz*- kaj *ŝanĝvaloroj* ne estas malsamaj objektoj. Ili estas nur malsamaj **kieloj manifestiĝi** de la objektoj **ĉe la burĝa socio**. Aserti, ke ene de la kapitalismo estas produktataj nur *ŝanĝvaloroj*, samvaloras aserti, ke ene de la kapitalismo la laborproduktoj estas varoj. Aserti, ke ĉe la komunisma socio (aŭ ĉe iu antaŭkapitalisma) estas produktataj *uzvaloroj* signifas, nur ke la produktado ne celas la profiton, sed la satigon de konkretaj bezonoj, t.e. ke tiu socio ne baziĝas sur la *abstrakta laboro*.

La verkintinoj asertas, ke la kapitalismo nur produktas varojn, sed ne socie utilajn produktaĵojn (15,2). Se tiuj produktoj ne estas socie utilaj, kiel ili povas efektiviĝi kiel varoj (trovi aĉetantojn)? Aliflanke, ili proponas reatingi en mondo tute regata de la kurzvaloro, la kategorion de la uzovaloro (15,2), kaj tion oni atingos pagante al la senlaboruloj salajron for de la merkato kontraŭ laboroj ekstermerkataj, sed socie utilaj (15,2). Estas tre malfacile kompreni, kion povas fari laboristo (la homo-varo) ekster la merkato (ĉu eble la merkato estas io alia ol la kapitalisma socio?), kaj pli malfacile ankoraŭ, kiel li povas **labori kontraŭ salajro** kaj sukcesi resti ekster la merkato. Kredi tion, ke la sendunga subvencio aŭ la pensioj estas eksteraj al la merkato, estas tiom erara, kiom kredi, ke la ŝtato restas super (ekster) la socio. La t.n. sociaj atingoj partoformas la salajron, ili partoprenas la t.n. *nerektajn produktadelspezojn*[6]. Ke la pensioj ne kurzas ĉe la borso (samkiel ne kurzas la literaturo) ne signifas, ke ili estu merkatfremdaj.

La solvo de la laboroj ekstermerkataj sed socie *utilaj* estas la klasika solvo de la politiko pri publikaj konstruaĵoj, de la piramidkonstruado, t.e. la t.n. *ensorbado de la troaĵa kapitalo*, pri kiu la faŝismo donis al ni ekzemploj brile antologiaj.

Praktike la propono, efektivigi laborojn financatajn pere de impostoj ĉe la kampo de la media zorgado kaj la ekologio (15,2), estas nenio krom la esprimo de la fakto, ke eĉ la aeron por spiri estas fariĝanta varo (kvankam ĝi ne kurzu borse)

La plivastiĝo de la senlaboreco ne estas teruraĵo

Ŝajnas, ke neniu el la tri proponitaj solvoj estas kapabla solvi la problemon de la senlaboreco, kaj oni ne vidas, kial iu el ili devas enhavi iun substancan renverson de la kapitalisma socia ordo (15,1). Tamen, kion mi deziras refuti, estas la *publika bildo*, kiun la verkintinoj konsideras *nepridiskutebla politika merito* de la sindikatoj (12,2).

Ne pravas, ke la plivastiĝo de la senlaboreco estas la ĉefa problemo de nia socio. Ĝi estas la ĉefa problemo de la ŝtato, de la kapitalistoj, sed de neniu pli.

La kreskado de la senlaboreco estas esprimo de la fakto, ke la homa korpa laboro estas fariĝanta superflua. Tiu ĉi estas la plej grava historia atingo de la moderno[7]. Kaj la laboristo (la sklavo de la moderno) devas danci ĝoje, ĉar jam hodiaŭ la kapitalo, kiel kondiĉo por povi ekspluati homan laboron, devas pripensi pagi salajron al tiuj, kiujn ĝi ne taŭgas ekspluati.

La nursola kialo, pro kiu tiu ĉi superflueco de la homa korpa laboro fariĝas mizero kaj marĝenigado, estas la fakto, ke la produktado celas la profiton, la *kapitalamasigon*. Tiu estas la *publika bildo*, kiun la laborista movado devas starigi antaŭ la laboristoj kaj antaŭ la t.n. *publika opinio*. Ĉiu diskurso pri la senlaboreco, kiu ne reliefigas tion, estas

nenio krom fumokurteno antaŭ la okuloj de la laboristoj.

Neniam la liberiĝo de la ekspluatato estis pli ebla kaj pli ĉe la atingo de la mano ol hodiaŭ, kiam, rimarkinde, la laboristoj forlasas ĉiun revolucian esperon kaj revas pri la aŭtentika utopio, pri tio neebla (kaj nedezirinda): la multobligado de la lokoj por ekspluati la salajratan laboron.

La lukto kontraŭ la laboro ĉeestis ene de la laborista movado ekde ties komenco mem. La ĉefa agita kaj lukta vorto de la 19a jarcento estis: 8 horojn por labori, 8 horojn por studi, 8 horojn por ripozi. Kaj la laborista sango fluis malavare por atingi mallongiĝon de la deĵordaŭro, por konkeri tempon por vivi. Hodiaŭ, kiam la agitvorto *abolo de la salajrata laboro* ŝajnas sin trudi per si mem, la sindikata movado kursekvas celserion, kiu povas esti resumita per *ekspluatadon por ĉiuj*.

*NOTOJ.-*

[1] ARMENI, Ritanna k GAGLIARDI, Rina: *La mallongigo de la deŭordaŭro. Ĉu efika rimedo kontraŭ la sendungeco?*, ***Kajeroj el la Sudo*** 33 (1997) 11-15

[2] Kvankam mi ne sukcesis trovi la unuan citaĵon ĉe la 1844aj manuskriptoj, kaj kvankam tie la *laboro* plurfoje estas nomata *senhomiganta*.

[3] Poste mi montros plian mistifan uzon de du marksaj teknikaj terminoj: la uz- kaj la interŝanĝvaloro.

[4] Oni rimarku, ke tio samvaloras malpliigi la salajron, kvankam oni povas aĉeti per la hodiaŭa salajro varojn nepensablajn por la laboristoj de la epoko de niaj gepatroj. Ne pravas, ke la laboristo gajnas pli hodiaŭ, kio okazas estas, ke la varoj de li konsumataj enhavas malpli da valoro.


[5] Oni rimarku, ke, se la nombro da senlaboruloj ne estas tiom alta, kiom simpliga *kalkulo* povus tiri el tiuj asertoj, tio estas kaŭzita de du kialoj: 1 la alta grado de demografia sindeteno: oni komparu la meznombran kvanton da gefiloj po laboristo ĉe la epoko de niaj geavoj kaj tiun de la hodiaŭa laboristo; 2 la eksportado de la sendungeco: la disfalo en mizeron de landoj kaj tutaj kontinentoj (inkluzive de la eks-USSR) estas nenio krom la ekstrema manifestiĝo de la plikreskiĝo de la senlaboreco ene de la kapitalismo.

[6] Estas ne hazarde, ke ili estas financataj per impostoj sur la produktado.

[7] Oni vidu MOYA, Giordano: *Senlaboreco*, ***Kajeroj el la Sudo*** 31(1996)5-6. La sinjoro Moya ankaŭ komprenas la gravecon de tiu atingo, kvankam li ŝajnas ne kompreni la objektivan kialon de la senlaborado kaj fidas je interkonsentoj ene de internaciaj organoj, kiuj povus decidi vendi 20 pocenton pli ol antaŭe (6,1). Laŭ mia opinio tamen la problemo ne estas **decidi** vendi pli aŭ malpli, sed **trovi aĉetantojn**.

*Jurgo Alkasaro*

# Emo al verko.



Scivola persono ĉiam havas iom por diri: diraĵon, direblon kaj ofte direndon. Scivolema ulo neniam timas demandi,kaj tio ĝenas malscivolemulojn. Tiu estas danĝera flanko de la afero. Sed tio ne gravas, ĉar scivoli estas vivi. Malscivoli estas malvivi.

*Marina*

Esperanto España franciiĝas!

Post la 23ª de junio, kelkajn partojn de ***Esperanto España*** oni povas kegu france dank' al laboro de Dominique Couturier en **http://www.dragonfire.net/~Esperanto/frespe.htm**. Estante la celo de nia paĝo disvastigi Esperanton, oni plue serĉas getradukistojn en ĉiun lingvon. Se vi povas kunlabori tiusence, bonvolu (ret)skribu al redaktoro: jesuo@mur.hnet.es aŭ Ap. 4461, ES-30080 MURCIA (HISPANIO).

# Mondunuiĝo

*de Giordano Moya*



Estas epokoj en kiuj la penso antaŭas la faktoj kaj gvidas ilin. Kontraŭe estas epokoj en kiuj la faktoj antaŭas al la penso, kaj oni ne scias kion fari.

Nia epoko estas tia lasta. Jam okazis la planedumiĝo per la komunikado kaj en la financaj aferoj. Interreto estis nepensebla atingo en la komenco de nia jarcento. Sed socie ne tiel okazis la planedumiĝo. La pensuloj de la pasinta deknaŭa jarcento nek antaŭvidis tiajn teknikajn ŝanĝojn nek la planedumiĝon. Pro tio la pasintaj idealismoj fiaskis kaj nuntempe oni restas sen orientiĝo.

En Eŭropo la vivnivelo altiĝis, ankaŭ la kondiĉoj de la laborado, malpli da horoj de laborado kaj pli ferioj, tamen, tiuj avantaĝoj ne aperas sekuraj kaj ekonomia krizo povas ilin forigi.

Eŭropo enhavas proksimume tri cent milionojn de loĝantoj kaj la eksteraj landoj, kuj industriiĝas, pli malpli enhavas mil du cent milionojn. Se la kondiĉoj de laboro de tiuj mil du cent milionoj estus similaj al la eŭropaj, okazos nenio, la vivnivelo samgrade ĉie altiĝus, sed tio ne okazas.

Ĉu la ĉitieaj laboristoj antaŭvidis tiun malegalecon? La nuntempaj laboristoj ne interesiĝas pri tiuj sociaj aferoj. Ili ofte pasigas la tempon rigardante piedludon kaj ĝuante la konsumeman socion. La mensa malkvieteco ne estas propra de la nuna laboristaro nek de la aliaj sociaj klasoj. Kun tia mensa sinteno ne estas strange, ke faktoj tiel vastaj kaj gravaj kiel la planedumiĝo forestas el iliaj pensoj.

Ni plendas, ke tiel same la neŭtrala esperantismo kiel SAT stagnas. Sur la unua paĝo de Sennaciulo aperas la moto *SATanoj, kutimiĝu la eksternaciajn sen-, pens- kaj agadkapablon. Lanti.* Sed tiu moto malmultajn personojn altiras, tute kontraŭe, multaj, en nia esperantista movado, eĉ laboristoj, estas altirataj al novaj naciismoj, precipe etnaj. Tia malprogresema sinteno volas retroiri la socion al la mezepoko, en tuta kontraŭa direkto de la progreso, kiu devas atingi la homarunuiĝon. Zamenhof kreis la lingvon Esperanto-n por unuigi la homojn en homaron kaj ne por disigi ilin en mezepokajn nacietojn laŭ la tezo de etnaj liberecoj. En la mezepoko la etna libereco konsistis el la servuteco de la plejmulto.

La nuna planedumiĝo ne estas alio ol la materiala homarunuiĝo sen la socia kaj morala. Pri la socia oni klare povas vidi, ke tio farenda estas la tutmonda organizo de la laboristoj. Estas videble, ke la nunaj naciaj sindikatoj taŭgas por nenio. Se ili en iu ajn eŭropa nacio atingas altajn salajrojn kaj konfortan asekur-

daŭrigas en paĝo 13-a

Gramatiko

# Solvo por la participa problemo,

de Juan Navareño

La verba konjugacio estas mirinda kreaĵo de Zamenhof kaj permesas per simplaj rimedoj nuanci la tempojn de la esperantaj verboj ekde la antaŭpasinto ĝis la postfuturo sen iu ajn problemo nek escepto.

La pasivigo de la frazoj estas ankaŭ tre facila, *mi fermis la pordon* estas pasive *la pordo estas fermita de mi*, kies signifo estas ekzakte la sama,kaj estas uzata ekde Zamenhof ĝis hodiaŭ, tute laŭ la 6-a regulo de la Fundamento.

Bedaŭrinde oni uzas la finaĵon -*ita* por montri nunan rezulton, forgesante ke -it- (laŭ la sesa regulo) signifas *estinta tempo*, ĉu estu uzata kun verba, adjektiva aŭ adverba sencoj, kaj ke la adjektiva uzo de -ita montras *pasintan rezulton* kiu povas daŭri aŭ ŝanĝi dum la tempo kiu pasis ekde la fino de la ago ĝis nun.

Tial la uzo de -ita por montri nunan rezulton nur povas esti tolerebla kiam estas uzata kun verboj kies rezulto ne povas ŝanĝi,kiel skribi, rompi, mortigi, ktp., sed ne kun verboj kies rezultoj povas ŝanĝi, kiel fermi-malfermi, varmigi-malvarmigi, ŝalti-malŝalti kaj ĝenerale ĉiuj kiuj havas aŭ povas havi la prefikson *mal*, kaj tiuj kiel konstrui, detrui, rekonstrui, ktp., kies rezulto povas esti ŝanĝita per posta ago.

Feliĉe, Esperanto havas multajn rimedojn ne esploritajn, kiel la sufikso *ad*, kiu kun la finaĵo -o estas uzata por substantivigi verbojn kaj kun la finaĵo -a povas adjektivigi verbojn, kiu estas ĝuste kion mi bezonas, verban adjektivon, kiu ne havas tempon.

Tia uzo estas ege simpla, kaj tute konforma kun la fundamento, ĉar nur bezonas uzi -*ada* pro montri rezulton kaj uzi -ita por montri agon.

Jen ekzemploj: *la pordo estas fermita* (pasinta ago). *La pordo estis fermada* (nuna rezulto). *La pordo estis fermita*(antaŭpasinta ago). *La pordo estis fermada* (pasinta rezulto). *La kafo estas varmigita* (pasinta ago). *La kafo estas* —aŭ ne estas— *varmada* (nuna rezulto). *Vundita*(kiu ricevis vundon). *Vundada* (kiu havas vundon: rezulto). *Kiam mi alvenis,* ***la fiŝo estis manĝada*** (pasinta rezulto). La sufiksoj -*iĝ* kaj -*ig*, ĉar ne interesas al la rezulto, oni povas ne uzi. *Varmigita* kaj *varmiĝita* havas la saman rezulton: *varmada*.

La pasivigo de *mi fermis la pordon* kiel *la pordo estis fermita de mi* (itista skolo), aŭ kiel *la pordo estis fermata de mi* (atista skolo), feliĉe preskaŭ ne konataj de la esperantistoj, estas ambaŭ malbonaj solvoj, ĉar estas mallogikaj, kontraŭfundamentaj kaj unu el ili ne permesas la uzon de la pluskvamperfekto kaj la alia de la imperfekto. La intencoj de ambaŭ skoloj estas bona, sed la rezultoj estas malbonaj.

Mi deziras kaj esperas ke ambaŭ skoloj aceptu la proponitan solvon, kiu estas pli logika, simpla kaj tute konforma al la Fundamento, kaj tiel malaperu la nunaj skismoj, kaj frate kaj amike ambaŭ laboru kune por la bono de Esperanto.

# Reago ......... Ĉu esperantisto aŭ esperantano?

de Gbeglo Koffi

En ***Kajeroj el la Sudo*** n-ro 33 januaro/marto 1997, paĝo 19, estas la artikolo *Pri Esperanta tradukarto...,* *de Fernando Diego. Ĉu esperantantisto aŭ esperantano?*, kiun subskribis John Hammer.

La sekvaj linioj temas ne pri la tuta artikolo, sed precipe koncernas la enkondukon: *lingvo estas pli perfida ..., pli grava ol ĝi aspektas*. La signifo de *-ist* montrata en la artikolo devigas min peti konsilojn de ĉiuj esperantistoj, kiuj perfektigas siajn gesamideanojn pri iliaj scioj esperantaj. Ĉu vere *-ist* signifas specialiston, kaj kio estus *esperantano*?

Ĉiufoje, kiam mi dubas pri uzo de gramatikaĵo, mi ŝatas esplori kaj skribi pri ĝi, por ke veraj lingvistoj kaj gramatikistoj helpu min ne plu dubi. Tiel, kvankam mi preskaŭ ĉiutage uzas la vortetojn *-ist* kaj *-an*,la artikolo de John Hammer igis min iomete reiri al miaj lecionoj.

La verko ***Prenu plu***, SAT-broŝurservo/Laŭte, FR-47470 Beauville 1995, sciigas:

*AN montras:

-membron de grupo, loĝanton de iu loko. Ekzemple: *Togolandano estas ano de Togolando. UEA-anoj, SEM-anoj.*

-adopton de iu doktrino. Ekzemple: *kristano, bahaano*.

*IST montras:

-Personon, kies profesion signas la radiko. Ekzemple: *panisto, juvelisto, ploristo, lernigisto*.

-Anecon al iu doktrino aŭ teorio. Ekzemple: *esperantisto, rasisto, budhisto.*

Notindas, ke por multaj teorioj en ISM oni povas anstataŭigi la literon **m** per **t** por nomi la adepton. Ekzemple: *turismo - turisto, budhismo - turisto, egoismo - egoisto*.

Tiuj klarigoj de ***Prenu plu*** montras al mi,ke la senco de *esperantano* estas ne klara, kaj *-ist* ne volas diri specialiston. Tiel *esperantisto* ne estus *specialisto pri Esperanto*, sed montras anecon al *esperantismo.*

La unua universala kongreso de Esperanto en Boulogne-sur-Mer estis grava por Esperanto, ĉar ĝi lanĉis la movadon per deklaracio pri ESPERANTISMO. Tiu deklaracio klare montras la signifon de *esperantisto.* Ni konsultu la Bulonjan Deklaracion! Du el la kvin punktoj de la deklaracio sufiĉas por informi nin:

*1-a punkto: La esperantismo estas penado disvastigi en la tuta mondo la uzadon de la lingvo neŭtrale homa, kiu ne entrudante sin en la internan vivon de la popoloj kaj neniom celante elpuŝi la*

*ekzistantajn lingvon naciajn, servu por interkomprenigo de la homoj diverslingvaj. Ĉiu alia ideo de iu esperantisto estas lia afero privata.*

5-a punkto (laŭvorte): esperantisto estas nomata ĉiu persono, kiu scias kaj uzas la lingvon Esperanton tute egale, por kiaj celoj li ĝin uzas. Apartenado al ia aktiva societo esperantista estas rekomendinda, sed ne deviga. (El ***Gvidlibro por Supera ekzameno***, de Alfonso Pechan).

Estas tre facile lerni Esperanton, sed malpli facile praktiki ĝin. Ni, esperantistoj, havas la taskon informiĝi pri la movado, lerni pri la lingvouzo de Zamenhof, kaj tiel ni povas pli bone praktiki la lingvon. Zamenhof profunde pensis antaŭ ol proponi ion. Do, kiam ni ŝatos kritiketi proponon lian, ni vidu unue, ĉu ie ne ekzistus io, kio jam klarigas tion. Tiel ni povas kompreni la grandegan laboron, kiun faradis Zamenhof. La Deklaracio pri Esperantismo estas kune kun la ***Fundamento de Esperanto*** gravaj kiel bazo de nia movado. La unua klarigas la signifon de esperantisto, kaj la senco de la sufikso *-an* montras nun al mi, ke *esperantano* estas monstro, kiu al mi signifas nenion.

*Gbeglo Koffi*

Venas el paĝo 10

sistemon, tio estas respegulata per la altiĝo de la vendoprezo de la varoj, la entreprenoj ruiniĝas kaj la laboristoj estas maldungataj.

La financa kapitalo investas tie, kie la laboristoj havas malaltajn salajrojn, laboras eĉ infanoj kaj la asekursistemo mankas. Ili reale estas kontraŭstrikantoj de kiu ajn ĉitiea socia peto. Nia mondo esta kiel sola grandega vilaĝo aŭ fakte kiel du grandaj urboj. Se unu el tiuj urboj laboras plialtpreze, ĝi perdus la aĉetantajn klientojn kaj la tuta laboro translokiĝus al alia urbo. Alie, tial ke ĉiu ŝtato volas altiri investojn de la internacia financa kapitalo, tiu financa kapitalo preskaŭ estas liberigita de impostado.

Kiel agi? Ĉu retroiri al la naciaj merkatoj? Malaperus la socia bonfarto en la grandaj nacioj kaj la novaj etnaj nacioj alvenus al runiĝo. Ili ĝuos sian folkloron en la mizero. Kio estas necese estas atingi la socian planedumiĝon. Se la entreprenoj estas transnaciaj ankaŭ la sindikatoj devas esti transnaciaj. La kondiĉoj de la laborado devas esti akordaj en ĉiu parto de la mondo.

Ĉu estas solvoj? Unu drasta, malaltigi la asekursistemon kaj salajrojn en Eŭropo, kiel proponas la registaroj. Alia sekvenda, altigi aŭ fondi asekursistemon, adekvatajn salajrojn, malpermeson de infana laborado en la aliaj mondpartoj. Por tio oni devas pensi kaj agi supernacie. La rimedo ekzistas, sed oni ne atentas ĝin.

Necesas, ke oni lernu la supernacian lingvon Esperanton kaj ankaŭ asimilu ties internan ideon. Nuntempe la homara unuiĝo jam ne estas nura idealo, sed nepra neceso por trapasi la krizojn de mondunuiĝo kaj atingi konkordan homarunuiĝon en socia solidareco.

*Majo, 1997.*

# Debatindaĵoj

## Letero de KAE

Ni ricevis leteron el **Kultura Asocio Esperantista**. Ni reproduktas ĝin, ĉar ni opinias, ke ĝi interesas al averaĝa samideano:


*Karaj kamaradoj: nome de la SAT-membroj Ramon Manau Torres, Vicento Hernández Llusera kaj la subskribinto, José María Galofré Domingo, mi kunsendas la tuj suban leteron kontraŭ la ekuzado, en la lasta paĝo de* **Sennaciulo**, *de januaro 1997, de la ovala surogato, kiel signo anstataŭanta la tradician verdan stelon.*

*En la espero, ke vi favore konsideru nian peton, kiun ni formulas individue kaj ankaŭ nome de la organizaĵo* **Kultura Asocio Esperantista**, *de mi prezidata, SAT-ane via,*

*Subskribas José María Galofré Domingo.*

La letero menciita estas jen:

*La subkribintaj SAT-anoj, nome propra kaj en tiu de la organizaĵo:* **Kultura Asocio Esperantista (KAE),** *energie protestas pro la neoportuna apero,en la certe bonvena nova rubriko EL ESPERANTO-*



*MOVADO, de la tiel nomata* rugbeo-pilka, *aŭ* ovala *surogato, anstataŭ tiu de Zamenhof aprobita insigno verdastela, jam tutamonde konata kiel la veran simbolon de nia Esperanto.*



*Tiu* ovala *vinjeto estas niaopinie - kan ni ne estas la solaj kun tiu kriterio- neakceptebla kiel anstataŭigo de la tradicia* verda stelo, *signo facile distingebla, krom tre adkvata, ĉar ja signifanta la kvin mondopartojn, kiujn celas Esperanto.*

*Esperante, ke vi komplezu nian justan peton, SAT-ane vin salutas: Ramón Manau Torres, Vicento Hernández Llúsera kaj José María Galofré Domingo.*

## KFD: Kutime Faritaj Demandoj pri Esperanto.

*16. Ĉu vi kredas, ke oni trudos Esperanton iam al la tuta mondo?*

Mi ne nur opinias, ke ne, sed mi ankaŭ ESPERAS, KE NENIAM oni trudu ĝin.

Parolante Esperanton oni povas nuanci tre klare. Tial, permesu al mi klarigi, ke oni ne trudas senshavajn ideojn, kiel ekzemple rondeco de nia planedo, aŭ boneco de justeco, ktp., sed oni finfine ADOPTAS ilin: ĉiuj alpropriĝas

Daŭrigas ĉe paĝo 30

# *La kazo post* elmigri *kaj aliaj demovaj verboj Erara uzo de la akuzativo en demovaj kuntekstoj.*

*de Bernard Golden*

La plej ofta eraro rilate uzon de la akuzativa kazo en Esperanto estas la ellaso de la n-finaĵo en gramatikaj konstruoj, kies reguloj postulas ĝin. De tempo al tempo esperantistoj faras alispecan, kontraŭan eraron kaj akuzativigas vortojn en situacioj, kiam tio tute ne estas pravigebla. En tiu ĉi artikolo mi pritraktos specon de erara akuzativo pro sia nekonsekvenca uzo kiel almova kazo post la *demova* prefiksoido *el*. Ĉiuj citaĵoj estas ĉerpitaj el la romano ***Materada*** de Fulvio Tomizza. Respondecas pri la malĝusta lingvouzo P.G. Soranzo, kiu tradukis la itallingvan libron en Esperanton.

## *ĜUSTA UZO DE DEMOVA PREPOZICIO KUN VERBO KUN DEMOVA PREFIKSOIDO*

La unuaj kvin frazoj estas gramatike ĝustaj kaj semantike neambiguaj. Ĉiu verbo estas kunmetita per demova prefiksoido, kaj demova prepozicio troviĝas antaŭ la devenloko.

1 El la preĝejo eliris la filo de Bortolo (pĝ. 155).

2 Ni eliris procesie el la preĝejo (pĝ. 157).

3 La forveturo el Giurizzani de Bortolo efikis samkiel ŝafo... (pĝ. 103).

4 ... ŝi estas el Petrovia: el ĝi elmigros ĉiuj (pĝ 146).

5 ... temis plejparte pri malnovaj proprietuloj..., kiuj jam estis pretigantaj la dokumentojn por elmigri al Triesto (pĝ. 77).

**Rimarko**: en frazo 4 la prefiksita verbo *elmigri* evidente havas la sencon de *demovo*, kaj la uzo de *el* antaŭ la urbonomo estas konforma al la konstruo en frazoj 1, 2 kaj 3. En frazo 5 mankas la nomo de la devenloko, el kiu oni elmigras, sed aperas informo pri la celo de la elmigrado —La urbo Triesto— antaŭ kiu staras la *almova* prepozicio *al*.

## ERARA UZO DE *ELMIGRI* KUN AKUZATIVIGITA LOKNOMO.

Nun komparu la sekvajn kvar frazojn:

6. Ĉu vi ne elmigros Trieston? (pĝ. 135)

7. Kaj nun ĉi tiuj bravaj homoj elmigros Trieston por distrumpeti el la stultuloj... (pĝ 90).

8. ... kaj oni instigas la popolon forlasi sian teron por elmigri Italion... (pĝ. 88).

9. Tiuj, kiuj ne volos resti, rajtos preni siajn aĵojn kaj elmigri Italion (pĝ. 29).

Estiĝo de semantika konfuzo kaj ambigueco.

La frazoj kun la verbo *elmigri* sekvata de *Trieston* kaj *Italion* estas konfuzaj kaj ambiguaj, ĉar la gramatika konstruo es-

tas malĝusta. Kvankam estas eble anstataŭigi la almovan prepozicion *al* per akuzativo de la loknomo, tiu eblo ne ekzistas eĉ en frazo 5 pro la verbo *elmigri* kun demova prefiksoido. Same frazoj 6, 7, 8 kaj 9 estas sencomankaj, ĉar la akuzativigita loknomo jen Triesto jen Italio *ne* estas la direkto/loko de kie ekiras/eliras la migrantoj sed estas la *celo* de ilia elmigrado. Tamen, per eta modifo de la frazoj, estas eble gramatike kaj semantike ĝustigi ilin. Ni uzu la radikverbon *migri* **sen** la demova prefiksoido *el: li migros Trieston*; *migri Italion*. Tamen, se oni insistas pri uzo de *elmigri*, tiam estas bezonata la prepozicio *al* antaŭ la nomo de la celloko kiel en frazo 5. Alternativa maniero ĝustigi la anomalian gramatikaĵon estas ŝanĝi la verbon *elmigri* al *enmigri*. Tiam frazoj 6, 7, 8 kaj 9 fariĝas ĝustaj: *enmigros Trieston*, *enmigri Italion.*

Aliaj demovaj verboj sekvataj de la akuzativo.

Tradukinto Soranzo ne estas la sola pekanto rilate tiun ĉi gramatikaĵon. Provu senerarigi la sekvajn du citaĵojn ĉerpitajn el la novelo ***Seĉjo*** de Jurij Mamleev, esperantigita de ruslingvulo Aleksandr Fjodorov (***La Gazeto***, n-ro 37, 1991, pĝ. 29-30):

1 Vera Semenovna, la panjo de la mortanta junulo elpafiĝis la ĝardenon unua (pĝ. 29).

2 Ŝi pensis, ke ek de la komenco, jam elkurante la korton, ŝi jam konsciis ke, kvankam ŝi renkontos homojn, neniu helpos ŝin (pĝ. 30).

En ambaŭ frazoj troviĝas po unu verbo kun la prefiksoido *el*, kaj sekvas ilin substantivoj indikantaj lokon, ambaŭ en la akuzativa kazo: *ĝardenon* kaj *korton*. Se oni relegas la misajn frazojn, estas evidente, ke nur unu interpreto estas ebla: ŝi unue **el**iris kaj poste **en**iris.

1 La virino **el**paŝiĝis **el** sia domo kaj iris **en** la ĝardenon.

2 La virino, **el**kurante **el** sia domo kaj **en**kurante **en** la korton...

Ankaŭ ***Plena Analiza Gramatiko*** (§178, Rim. III) klarigas, ke *eliri urbon* estas ambigua, ĉar ĝi povas signifi: 1 eliri el urbo, kaj 2 eliri kaj direkti sin al urbo. Postulo fari mensajn akrobataĵojn por kompreni la signifon de tiu gramatika konstruo ne estas konsilinda en planlingvo, en kiu estas necese esprimi ĉion rekte kaj kristalklare. For la ambiguecon!

# Ĉiam sonante...

Hispana kulturo funebras, ĉar la plej bona gitaristo el la mondo, S^ro^ Narciso (García) Yepes, mortis 69-jaraĝa, la 4-an de majo en Murcia. Don Narciso ĉiam vivos



ĉe ni per siaj *Malpermesitaj Ludoj* kaj *Concerto de Aranjuez,* siaj plej mastraj interpretoj.

*Deutsche Gramophone* antaŭ nelonge kompilis siajn interpretojn en deko da CD, facile troveblaj en diskovendejoj. Baldaŭ oni trovos TTT paĝon pri li. (http://www.dragonfire.net/~Esperanto/yepes.htm)

# Uea delenda est!

Oni scias, ke malnova *Cicero*, ĉe la Romia Impero, kutime finis siajn paroladojn ĉe la Romia Senatejo per tiuj vortoj: *Cartago delenda est*: oni devas detrui Kartagon. Mi ne diras, ke ni devas detrui la Universalan Esperanto-Asocion, ĉar ĝi estas la *plej universala* esperanta asocio kiun ni havas nuntempe, kvankam ĝi ne estas la plej asocia, kaj ankaŭ ne la plej esperanta. Perfekteco ne ekzistas, mi kredas.

Sed UEA donas servojn kiujn neniu ajn havigas, kiel delegitaron, jarlibron, eldonon de libroj, kaj kunrilatigon de esperantistoj per siaj kongresoj jaraj. Multekostaj kongresoj, sed la plej ŝatataj kongresoj. Nuntempe, kelkaj esperantaj asocioj faras *kelkajn* agojn same kiel UEA, sed UEA faras ilin ĉiujn.

Ni revu pri ostempo, kiam Esperanton parolas multe da homoj tra la tuta mondo, kaj oni povas vojaĝi ĉien en la mondon komprenante ĉiujn, ĉar oni jam lernis nian lingvon utilan en la unuagrada lernejo. La lingvaj muroj, pli malamaj ol berlina muro, jam falis antaŭ multaj jardekoj, kaj ni ĉiuj komprenas kion oni diras al ni ie ajn. Tiuostempe ankaŭ, historilibroj diras, ke ekzistis tempo kiam oni ne uzis Esperanton ĉie en la mondo, nur kelkaj kvazaŭfrenezuloj obstine uzis kaj lernigis naivulojn pri la lingvo de la estonto. Iliajn librojn pretigis asocioj privataj, kies plej granda estis la tiel nomita *Universala Esperanto Asocio*. Ĝi havis milojn da delegitoj ĉiulande, kiuj solvis praktikajn problemojn al esperantistoj transirantaj. Kiam Esperanton oni adoptis en la tuta mondo, UEA ĉesis ekzisti, ĉar ĝin oni ne plu bezonis, farante ĝiajn taskojn multe pli efike la oficoj registaraj kaj fakaj asocioj, el kiuj kelkaj, ekzemple SAT, jam ekzistis en la *katakombaj tempoj* pasintaj...

Ni revenu astempen, vidante kial *UEA delenda est*: kiam la mondo adoptos Esperanton, UEA ne plu ekzistos, kvankam ĉiam estos esperantistoj. Sed ili eble estos superlingvistoj, pli klerigaj ol tiuj lingvistoj hodiaŭaj. Ĝis kiam tio okazos, ni devas subteni UEAn kaj flegi ĝin kiel kanceran malsanulon, kiu nepre mortos, sed al kiu ni helpos tiel, kiel li estas, ĉar mi skeptike opinias, ke oni ne povas plibonigi ĝin. Aliaj pensemuloj, pli lertaj ol mi, jam signalis la malbonaĵojn de UEA, sed ili pli naivas ol mi, ĉar mi serioze opinias, ke se eblas havi pli bonan asocion esperantan ol la nuna UEA, oni devas nepre fondi ĝin denove. Tial mi estas fakdelegito de UEA, por kunlabori dum ĝi daŭras...

SAT estas alia afero, tute malsimila. Mi aniĝis SAT-on ĉirkaŭ la jaro 1992. Mi ricevis interesan magazinon, kiu pritraktis ĉefe *movadajn* kaj kongresajn aferojn. Tiam alvenis 1993, kaj mi iris al kongreso de UEA en Valensjo. Multaj etaj okazintaĵoj okazis, kiuj kaŭzis grandan ĝenon al mi, kiel ekzemple kataluna krokodilaĵo antaŭ la tuta geesperantistaro, mankante reago el la Kongresa Ĉeftablo. Mi esprimis mian ĝenon per tre akra letero, kiun mi sendis al ***Esperanto*** (kvankam mi ne esperis, ke ili publikigos ĝin, sed mi volis doni al ili la eblecon esti memkritikaj. Mi ne eraris, tamen) kaj al aliaj revuoj esperantaj. SAT respondeculoj ne respondis, kaj tial mi resendis la leteron al la respondeculo de la revuo de SAT, tiutempe loĝanta en Britio, mi kredas. Sed tempo pasis, kaj mi ne ricevis respondon, kaj la artikolon neniu publikigis, nur Marco Botella faris

tion en ***Kajeroj el la Sudo***. Sekve, mi skribis al SAT dirante, ke mi lasas la asocion, ĉar kritikoj ne estas agnoskataj en ĝi. UEA estas esperanta organizaĵo, sed SAT, laŭstatute, estas asocio kultura de laboristoj kiuj uzas Esperanton kiel ilo, sed ĝi ne estas esperanta asocio. Ili uzas Esperanton por siaj celoj, kaj tion farante ili iĝas avangardo de la esperantistaro, kiu nur celas paroli kaj lerni Esperanton. Tial, mi opinias, ke SAT ne mortos kiam oni akceptos Esperanton (ĝi eĉ kreskos tiam), sed tial oni devas postuli al SAT, ke ĝi plenumu sian taskon. Sed ĉar ĝi malsukcesis en 1993, mi senokupiĝis pri SAT. Eble SAT ŝangis, sed mi devas vidi ĝin mi mem. Mi iros al kongreso de SAT ĉi jare, se mi povas. Se mi vidus, ke mi nun eraras, eble mi aliĝus, se oni permesas min. Sed oni bezonas pli bataleman SAT ol tiu, kiun mi vidas. Ne batali estas bone por nenio. Erari estas pli malerara ol ne agi.

Eble vi ne komprenas mian kialon por forlasi SAT, sed legante, ke nia prezidanto plendis, ke la redaktoro de ***Kajeroj el la Sudo*** ne estas ano de SAT, mi opiniis, ke mi devis klarigi la aferon. Se ni volas plibonigi la mondon, ni devas unue plibonigi niajn esperantajn rondon, ĉefe la plej valoran, SAT.

*Jesuo de las Heras*

# El nia Libroservo,

## *aŭ Libroj ne Mordas (nek murdas)*



Honeste mi devas diri, ke ĉiam mi ŝatis la librojn. Ĉiam mi ilin trovis hejme kaj ĉiam mi konsideras necesa havi libron enpoŝe. Do, ĉiam mi parolas favore al legado kaj defende al libroj.

Tial mi ankaŭ ŝatis SAT ĉar unu el ties celoj, fiksitaj en la *Statuto* kaj ***Regularo***, tekstas tiel: *c) lernigadi, instruadi, klerigadi siajn membrojn tiele, ke ili fariĝu la plej kapablaj kaj plej perfektaj el la tiel nomataj internaciistoj*.

Por klerigado kaj kleriĝado oni bezonas legi kaj por legi estas necesaj la libroj. SAT eldonas librojn, ties libroservo havas librojn. Ĝis tie ĉi ĉio en ordo, sed se oni rigardas funden oni trovos mankon. SAT eldonas librojn, sed malmultajn ĉar oni ne aĉetas ilin. La libroservo havas multajn librojn, ĉar la malmultajn kiujn SAT sukcesas eldoni, oni ne aĉetas.

Logika konkludo estos do ke la SAT-membraro estas nek la plej kapabla nek la plej perfekta inter la internaciistoj. Eĉ ne instruata, lernema aŭ klera.

Tio kion mi diras eble estas troigo, kaj miaj pripensoj venas nun el pesimisma rigardo al la nuna stato de la HALE-libroservo (via libroservo, kamaradoj!), kies respondeculo mi estas. Jam unu jaro mi postenas kaj la plej bona kliento estas..., mi mem! Krom tio nur malmultaj mendis ion. Malbeninda nelegemo!!!

*Nikolao Ŝil Karbaĝo*

# He, amiko, ci legi ĉi tie!

Kara razitkapulo (skin-nazi, aŭ bone-head)!

Mi skribi per facilaj vortoj por ke ci povi kompreni. Mi legi en ĵurnalo, ke ci esti *besto*, sed mi ne kredi. Mi kredi, ke vi esti nescia kaj nescio esti granda problemo por ĉiuj, ankaŭ por mi. Ĉar nesciulo esti homo malforta, kaj homo malforta havi timon, kaj timulo esti homo kiu fariĝi agresema kaj fari *bonk* per bastono sur kapon de sendefenda homo.

Mi voli diri tion: se ci bati sendefendan homon, ci ne montri cian forton, ci montri cian malforton kaj stultecon, ĉar frakasita kapo ne solvi cian problemon.

Cia problemo esti, ke ci vivi en kvartalo de merdo, sen laboro kaj kun laboro de merdo. Cia problemo esti, ke ci esti lasta rando de ĉaro, kaj tial vi voli iĝi forta kaj pravi. Sed neniu fortiĝi bati (kvardek kontraŭ du) du malfortajn homojn. Se ci voli esti forta, ci devi ribeli cian malforton. Ci devi pensi. En cia kranio razita esti cerbo. Cia cerbo bezoni manĝon, same kiel cia stomako. Ci tiam provi *paroli, legi* kaj demandi cin kial ci vivi vivon merdan. Tio esti kulturo, kaj



kulturo esti la sola forto por plibonigi homojn.

Mi scii: lego esti lacige. Pensi esti eĉ pli lacige. Multe pli lacige ol krii *nigrulo merda* aŭ *malpura judo*: krii stultaĵojn esti tre facile. Ĉiuj ebli insulti kaj malami.

Al mi ne gravi, ke ci razi kranion aŭ uzi militistajn botojn; laŭ mi ci povi meti artiŝokon kvazaŭ ĉapelon kaj tatui cian gluteon. Al mi gravi, ke ci respekti cin mem, cian cerbon kaj cian dignon. Tiel, eble ci lerni ankaŭ respekti aliajn homojn.

Se ci krii *malpura judo*, ci devi scii almenaŭ kio esti *esti judo*. Se ci scii kio esti esti judo, ci provi demandi al ci kiel ci ŝati, ke oni bruligi cian patrinon, patron, fratojn, amikojn ciajn, ci-n mem. Se vi komenci demandi, ci komenci venki. Demandoj esti kiel ŝlosilo por aŭtomobilo: sufiĉi unu por ek-marŝigi motoron kaj iri malproksimen.

Mi, tre zorgi pri ci (kaj ankaŭ por kapoj de tiuj batotaj de ci). Mi zorgi, ĉar Povo vidante nesciajn homojn, fari du aferojn: meti cin en malliberejon (kaj malliberejo esti kiel grandega *bonk* sur via kapo), aŭ male uzi cin kiel sklavon, sendi cin bati, turmenti kaj bruligi aliajn, dum ĝi loĝi en bona domo, havi bonan aŭtomobilon, kaj bonan inon. Ĉu ci voli esti libera? Konservi cian kranion razita, sed lerni ami cian cerbon. Forto kaj povo loĝi tie: *en* la kokoso, ne *sur* la kokoso. Ĉao!




*Maro*

# Laboristoj Privilegiitaj: La sindikataj delegitoj

La *Statuto de la Laboristoj*[1] agnoskas en sia artikolo 61ª la rajton kiun havas la laboristoj partopreni la aferojn de la entreprenoj ĉe kiuj ili laboras pere de la reprezentaj organoj, ĉu kiel delegitoj de la laboristoj ĉu ene de entreprenaj komitatoj.

En tiu ĉi priopnia artikolo mi esprimos kiel oni estas utiligante je la profito de malmultoj, normojn faritajn por garantii la partoprenon de la laboristoj ĉe siaj entreprenoj. Kiel? Kial? Antaŭ la terura minaco de la sendungiĝo, antaŭ la timo pri la ekslaborigoj okaze de staboreduktoj en la entreprenoj, ekzistas kelkaj privilegiitoj, ili estas la laboristoj kiuj reprezentas siajn kunulojn.

La artikolo 68ª de la *Statuto de la Laboristoj* establas garantiojn por tiuj reprezentantoj, jen estas:

1e Malfermo de proceso kontraŭdira antaŭ la kulpigo al ili pri kontraŭnormaĵoj gravaj aŭ tre gravaj.

2e Prioritato de ili antaŭ ol la ceteraj laboristoj por konservi siajn dungojn.

3e Ili rajtas ne esti eksdungataj aŭ sankciataj dum la ekzercado de siaj mandatoj aŭ en la limitempo de unu jaro post la fino de ĝi.

4e Ili rajtas libere esprimi siajn opiniojn eĉ publikante aŭ disdonante la publikaĵojn de labora aŭ socia interesoj.

5e Rajton ili havas disponi de kredito konsistanta el kelkaj monataj pagataj horoj por la ekzerco de la taskoj rilataj al siaj mandatoj.

Kiel oni povas observi la punktoj 2a kaj 3a substenas la kvalifon je privilegiitoj kiun mi antaŭe uzis pri la laboristaj reprezentantoj.

Iu povus argumenti ke tiuj laboristoj bezonas la menciitajn garantiojn antaŭ la entreprenistoj, ĉar siaj taskoj reprezentaj ordinare kunportas konfliktojn, ĉar la interesoj de la laboristoj ne estas koincidantaj kun tiuj de siaj ĉefoj, kiuj ĉiam strebas unuacele al la maksimumo de la profito; kaj antaŭ tia argumento mi devus rekoni ke ja ili ludas rolon kompromitan kiu bezonas garantiojn, sed kiel oni povas justigi la artikolon 63.3 de la *Statuto de la Laboristoj*? Tiu artikolo establas la daŭron de la mandatoj de la stabaj delegitoj kaj membroj de la entreprenaj komitatoj je 4 jaroj, kaj ankaŭ, ke ili nur povos esti senmandatigataj de la laboristoj kiuj elektis ilin, pere de asembleo petita de almenaŭ triono el la elektintoj, kaj necesos absoluta majoritato el tiuj.

Tamen, tiu senvalidigo povos nek efektiviĝi dum la formalpaŝigo de kolektiva akordo inter la laboristoj kaj la entreprenaj mastroj, nek esti denove proponata antaŭ ol 6 monatoj de la antaŭa.

Tiu ĉi artikolo devas esti relegata por kompreni siajn konsekvencojn plene.

Nu, ek al reflekto! Unuflanke la artikolo 68ª de la *Statuto* igas netuŝeblaj la reprezentantojn de la laboristoj supozinte, ke ili plenumas la devojn de siaj mandatoj, sed, samtempe ĝi efikas alie, tre pozitive por ili, sed ege male por la ceteraj laboristoj en la plejmulto el la kazoj, ĉar la menciitaj privilegioj donas al la laboristaj preprezentantoj kvazaŭ permeson korsaran kiu ebligas ilin negoci tiujn amasajn sendungojn, aŭ tiujn fruaemeritiĝojn aŭ staban modifojn iom

1 Leĝo de Hispanio kiu konsistas el amaso da normoj por defendo de la rajtoj de la laboristoj.

kompleze al la entreprenestroj; ***ili ne estas inkludotaj en la dramoj***, kaj eĉ se ili devus foriri, ili okupus la lastajn vicojn. ***Beninda avantaĝo nuntempe!***

Sed restas ankoraŭ io ege pli malfacile defendebla, kaj kies profitoj estas nur por la sindikatoj. Kiel oni povas defendi ke la laboristoj kiuj donis sian konfidon al aliaj kunuloj por ke tiuj ĉi ilin reprezentu, devos alfronti la artikolon 67an de la *Statuto,* kiu plifirmigas la malfacilecon por senmandatigi siajn reprezentantojn? Kaze ke la laboristoj volus kunvoki asembleon ili bezonus trionon el la tutaj balotoj tiucele, kaj ankaŭ absolutan majoritaton por senigi la konfidon donitan. La leĝo diras eĉ pli: *Tamen, la senmandatigo nek povos efektiviĝi dum la formalpaŝigo de kolektiva laborist-mastra akordo, nek oni povos denove proponi ĝin antaŭ ol 6 monatoj*. Tio estas, se iu reprezentanto laborista estas rubrikante kun sia estro kondiĉojn malfavorajn por la plimulto el siaj kunuloj, aŭ simple li perdas la konfidon de tiuj, kiuj elektis al li, la elektintoj ne rajtas senmandatigi tiun ulon ĝis la fino de la formalpaŝigo de la akordo, t.e., rubrikite ĝin. Krome, se oni proponas pridebati la konfidon donitan al la reprezentantoj, necesos ses monatoj ĝis la proksima ŝanco.

Tiuj ĉi du artikoloj de la *Statuto de la Laboristo* eble estas tiuj, kiuj estas kreantaj la tensiojn kiujn oni travivas nuntempe ĉe la entreprenoj inter la laboristoj kaj siaj reprezentantoj. Ĉiun tagon estas pli ofte vidi bildojn kiuj montras tiajn reprezentantojn preskaŭ en la neceso esti protektataj de la polico kontraŭ siaj kunuloj, kaj en kiuj la insultoj, senmeritigoj kaj eĉ ĵetoj de ovoj, tomatoj kaj ŝtonoj pripensigas ke la sento de senpoveco kiu estigas la malebleco de senkonfidigoj estas la kialoj de la priskribitaj scenoj.

La socia tensio estas forta, la reprezentantoj gardotaj de la menciita leĝaro, negocas, akordas kaj rubrikas solvojn por la *aliuloj*, sentante sin, kaj estante ili en la praktiko, malsama kolektivo; ili estas **reprezentantoj de la laboristoj** al kiuj ***la leĝo protektas por ke ili rompu la solidarecon kun siaj samuloj***.

***Maite Alcalá,***
*advokatino kunlaboranta de **Societo Autogestión** (Memregadon)*



## *Vane*

Sur arbara muskorando
morgaŭ sonos la komando:
*Pafu!*
Dekdu pafos kaj mi mortos...
Dekdu trafos! Ĉu mi fortos
sur arbara muskorando?
*Pafu!,*
morgaŭ donos la komando.

Sub folia branĉaltaro
morgaŭ krios la barbaro:
*Pafu!*
morgaŭ krios la barbaro...

Kapon alte en mateno!
Morgaŭ krudos la malbeno:
*Pafu!*
Dekdu sklavas; mi— libera!
Mort' ne gravas, sed fiera
kapon alte en mateno...
*Pafu!*
vene krudos la malbeno!

# Nekrologo



Post 10 jaroj de iom post ioma malsano forpasis, la 13an de Majo 1997, Francisco Zaragoza Ruiz (fransisko saragosa rŭis'). Dum sia tuta kapabla vivo, li elstaris kiel agema membro, neniam disputema pri ideologiaj diversecoj. Dum la intercivitana milito li deĵoris en la respublika armeo sed pro disruiniĝo de la lojala hispana registaro li devis fuĝi eksterlanden kaj en tiu aventurema odiseo, kie Esperanto estis por li tre utila, li atingis Bruselon. En tiu vojaĝo, plena de neatenditaj novaĵoj, li estis ege helpata de aktivaj samcelanoj en etapoj, foje proksimaj alie pli longdaŭraj.

Kiel esperantisto, membro de Sennacieca Asocio Tutmonda, li helpadis kaj partoprenis en la SAT, kongreso okazinta en Valensjo en la jaro 1934.

Li revenis el Bruselo en la jaro 1955.

Kiel membro de la Asocio ni partoprenis en la SAT-kongreso okazinta en la jaro 1974 en la norda itala urbo Bérgamo, kie la okopo grupa de Callosa de Segura estis rimarkinda en la kongresaj programeroj.



Francisco Zaragoza Ruiz estis la ĉiama partoprenanto kaj aktivanto en la hispanaj kongresoj de Esperanto, lia iniciatema idiosinkrazio igis lin tre rimarkinda en la esperantistaj eventoj, Tio okazis ĝis la hispana kongreso okazinta en Madrido en la jaro 1987, lia posta longdaŭra malsano malebligis lian pluan partoprenadon en kongresoj.

Lia perdo en la esperantista aktivado, kvankam pro malsano ja plurjare atendita, lasis inter lia amikeca reto aflikton kaj nostalgian revon.

*José María Bernabéu Franco*




**Don Fransisko kreis la *perfrazan metodon*, per kiu multoj ekesperantistiĝis.**

# Kion ĉiuj devus scii pri la strukturo de la homa korpo

Kiam la homa korpo formiĝis, ĉiuj siaj partoj volas esti la Estro. Cerbo diris: *tial ke mi kontrolas la tuton kaj pensas por ĉiuj, mi devas esti Estro.* Piedoj diris, *ĉar ni portas la korpon tien, kie Cerbo volas, kaj permesas al li fari kion li volas, ni devus esti Estro.* Manoj diris, *ĉar ni faras la laboron kaj gajnas monon por subteni la tutan korpon, ni devus esti la Estro*. Kaj simile diris Koro, Okuloj, Oreloj kaj Pulmoj.

Finfine Fektruo parolis kaj petis esti la Estro. La aliajn partojn de la korpo ekridegis pri la ideo, ke Fektruo estrus la korpon.

Sed Fektruo koleriĝis, kaj fermante sin, li rifuzis labori: rapide, Cerbo kunfebriĝis, Okuloj strabis kaj vitreskiĝis, Piedoj multepeziĝis kaj malfortiĝis troe por marŝi, Manoj pendis senforte kaj Koro kaj Pulmoj batalis por pluvivi. Tiam, ĉiuj petegis al Cerbo, ke li cedu kaj permesu al Fektruo esti la Estro. Kaj tiel oni faris!

Ĉiuj partoj el la korpo faris sian laboron, dum Fektruo direktis ĉiujn kaj zorgis ĉefe pri merdo, kiel ĉiu Estro kiu meritas tiun titolon ja devas fari!

MORALAĴO: ne necesas esti cerbo por iĝi Estro. Fektruo evidente havas pliajn ŝancojn. RIGARDU VIAN ĈIRKAŬAĴON POR KONVINKI VIN!

*Jolando*

# Socia Problemo en nia asocio.

Verkis: Liberecana frakcio de SAT.

Eldonis: SAT-broŝurservo. Beauville 1996-a. 43 paĝoj. 10 francaj frankoj.

Ofte al liberecanoj, kaj kun intenco moki nin kiel utopiulojn, oni demandas kia estos la Anarĥio kaj defias nin prezenti kompletan projekton pri kiel devos esti nia libera sociordo. Mi ĉiam respondis, ke mi nek povas, nek volas antaŭdifini kiel ĝi estos, ĉar tio estos afero de la tiamaj homoj kiuj estos konstruantaj ĝin. Ke mi ĝin ne vidos kaj ke mi nur povas strebi al ĝi, mi plene konscias. Tial mi neniam ŝatis babilaĵojn pri *tio estos tiel aŭ iel*, ktp.

Sed jen venas al ni skizo, bazita sur historiaj spertoj, pri la ĝeneralaj trajtoj de la liberecana socio. Liberecanoj kaj neliberecanoj havas nun taŭgan ilon por larĝatrajte bildigi al si kio povas esti anarĥio kaj kiel ĝi ordiĝos. Surbaze de tia skizo, kun kiu oni povas kunsenti aŭ ne, oni povas revi, opinii, diskuti, interkonsenti..., kaj fine, partumi en la klopodoj por konstruado de libera socio.

Tie kuŝas la merito de l' broŝuro, ke ĝi ne starigas fiksan nediskuteblan programon sed pensinstigilon por ke ci konsciu pri kiom oni povos atingi...

*Snajpero. Ferialo 1996-a.*

# Iniciatoj kontraŭ la sendungeco

La sendungeco devenigas ĉiujn sociekskludajn problemojn. Miloj da civitanoj, precipe el la plej malfavorataj kolektivoj, suferas tiun ĉi senmizerikordan malfeliĉon. Karitaso[1] , konsciiĝinte pri la seriozeco de la situacio, disvolvas sporadajn iniciatojn por krei dungojn.

En socio kie la dungeco estas la sola rimedo por la disdonado de la riĉeco kaj por la socia integriĝo la dungomanko estas vera dramo. La tuta socio alprenis la trascendecon de tiu ĉi grava problemo. Fakte, 82 pocento el la civitanaro konsideras, ke la sendungeco estas la ĉefa socia problemo,laŭ enketo farita de CIS (Hispana Centro por Sociologiaj Esploroj).




Tiuj, kiuj tre bone scias la implicojn de la labormarketa ekskludo, estas tiuj junuloj kiuj 25-jariĝas ne trovinte siajn unuajn dungojn; ankaŭ la virinoj kun nekunhavitaj respondecoj kaj ekonomiaj rentoj malaltegaj; la delongaj sendungitoj pli ol 45-jaraĝaj kiuj perdis siajn laborpostenojn kaj estas konsiderataj kiel *tro maljunaj* por aliprofesiiĝi, jen la tri grandaj grupoj al kiuj ĉefe celas la dungoprogramo.

La dungoprogramo de Karitaso estas funkciante de antaŭ 17 jaroj, ekde kiam la 35-a asembleo de Karitaso aprobis ĝin.

La Episkopa Konferenco[2] publikigis admonon esprimantan: *Ni petas insiste* Karitason *ke, ene de la atencoj kiujn ĝi devas alfronti, ĝi donu prioritaton al la sendungeca temo.* Naskiĝis tiel multaj komisionoj kiuj luktis kontraŭ la sendungeco en ĉiuj diocezoj[3] de Hispanio, kvankam kun malegalaj efikoj.

## *Struktura sendungeco*

La spertuloj estas finakordintaj ke la sendungeco estas struktura problemo, ke la ekonomia kresko ne estas ligata al la kreo de laborpostenoj kaj ke la socioj bezonas ĉiun fojon malpli da laborforto por atingi plian riĉecon ol antaŭe.Andrés Aganzo, la plej grava respondeculo de la menciita dungoprogramo de Karitaso, flankenigas la statistikojn kaj erudiciulajn opiniojn por komenti ke nature ĉiun fojon alvenas pli da sendungitoj por peti la helpon de la bonfara organizaĵo. La industrioj kaj agrokulturaj restrukturigoj same kiel tiu de la servofako forpelas multnombrajn laboristojn.

La celotoj de tiu ĉi socia agado havas kiel trajtojn esti elĉerpintaj la subtenhelpojn de la ŝtato, kalkuli kun gravaj malfacilaĵoj por profiti la ekzistantajn rimedojn, kiaj estas la formadkursoj aŭ la laborkursoj kaj mankohavi ĉirkaŭĵojn kiuj helpas ilin socielabore integriĝi kaj ne disponi de la adekvataj instruo, kapacito kaj stimulo.

La programo rigardadas tri globalajn tipojn de agado: la informadon kaj

orientigadon, la formadon por alfronti kun garantioj la eniron en la labormarketon kaj konkretajn helpojn al iniciatoj memdungoj kaj kolektivajn dungojn. Por subteni finance ĉilastan agadon ili buĝetis 1200 milionojn da pesetoj el solidaraj civitanaj kontribuaĵoj.

Tiuj ĉi konkretaj dungigaj projektoj ĉiun tagon atingas pli da graveco. Ili pruvas, ke la civitanoj kapablas serĉi solvojn por siaj prblemoj, se ili ricevas sufiĉan apogon el la socia ensemblo. Eble ni ĉeestas en granda ŝanĝo de la maniero koncepti la bonfaradon. Aganzo pensas, ke doni monon malutilas la doninton same ol la ricevinton, ĉar tio ĉi senaktivigas la kapaciton lukti kaj organiziĝi de la popolo. Oni agadu direkte al enartikiĝo kaj gradaltiĝo de la malutilitoj. Laŭ li, la Bonfarta Ŝtato miskomprenita estas iginta ke la civitanoj atendu pasive ke aliuloj solvu siajn problemojn. Rompiĝis tiel la propra senco de la laborista lukto.

## *Iniciatoj.*

Estas, eble, en Eŭskio (vaska lando) kie pli profunde sentiĝas la priokupiĝo por disvolvi realismajn proponojn por krei dungojn. Karitaso de San Sebastiano (unu el la ĉefurboj de Eŭskio) kreis en 1989-a konsiliejon subtenontan projektojn entreprenajn el personoj kun malfacilaĵoj por laborintegriĝoj, cele al la estigo de novaj dungoj. Ĝia nomo estas Bulta-Lan Konsultejo. Per ĝia helpo oni estas stariginta pli ol 359 entreprenojn kiuj jam dungis 1036 laboristojn. La akcioj de tiu ĉi kompanio apartenas al Karitaso de San Sebastiano kaj de Bilbao (alia ĉefurbo de Eŭskio), ĉiu kun 40 pocento, kaj al la kooperativoj laborantaj ene de la starigita strukturo apartenas la ceteron.

Tiu ĉi *fabriko de fiŝkaptokanoj*, kiel kelkaj ĝin nomas, starigis antaŭ kelkaj jaroj Jazkilanon, kiu estas kompanio kiu sin dediĉas al la produktado de vestaĵoj pere de kontraktoj por ekskluzivaj komercigoj de varoj de aliaj firmaoj. La menciita konsultejo estas investinta 77 milionojn da pesetoj kaj pruntepreninta aliajn 45 milionojn. Nuntempe estas sep la kooperativoj asociigintaj ricevantaj konsultojn librotenadojn, laborajn, impostajn, kaj klientoserĉajn.

La virinoj senprofesiaj formadoj estas la ĉefaj petantoj de tiaj ĉi helpoj. Ankaŭ, kvankam je pli malgranda kvanto, junuloj kiuj ne finis sian bazajn studojn lernejajn interesiĝas pri tiuj ĉi projektoj. Se oni konsideras ke ekzistas eblecoj disvolvi iniciaton, la proponintoj de ĝi ricevas profesian formadon dum 9 monatoj. La Vaska (aŭ Eŭska) Administracio subvencias tiujn ĉi kursojn kaj pagas al la estontaj kooperativanoj per mono kiu poste utilos por poparte konsistigi la komencajn kapitalojn.

Karitaso pruntedonas monon je 5 pocento de interezo redonotan post 4 jaroj celante satigi la komencajn bezonojn. Ĉiu el la kooperativoj estas devigita reenkasigi 6-pocenton el la farota enspezaroel Jazkilano kiel pagon de la ekskluziva distribupermeso. Tiel Jazkilano povas denove helpi al aliaj kooperativanoj.

Ankaŭ en la diocezo de Barcelono oni realigas similajn spertojn. pere de la fondaĵo *Formació i Treball* oni celas helpi al personoj kun grandaj mankoj adaptiĝi al la postuloj de la labormarketo kun garantioj de kontinueco kaj efiko, kaj ankaŭ kompletigi la formadon komencintan per la kursoj starigitaj de la dioceza Karitaso. La fincelo estas ke tiaj homoj estiĝu aŭtonomaj kaj memsufiĉaj danke al laboro.

Tiu ĉi fondaĵo realigas aktivaĵojn kunmetitajn de produktado kaj formado, por tiuj kiuj bezonas suplementon antaŭ ol alfronti la labormarketon; aktivaĵojn produktajn por homoj kies laboraj kutimoj estas malmultaj kaj ne havas sufiĉan intereson por la dungistoj; kaj konsultorientigan servon.

Kunlabore de la Caixa (prononcu 'lakajŝa', temas pri kredita institucio), oni ekfunkciigis 4 okupajn metiejojn: unu, por kolektado, enklasigado kaj distribuado de uzitaj vestaĵoj, alian por kolektado, muntado, distribuado kaj riparado de uzitaj mebloj, trian, por loĝa reebligado de domoj, kaj la lastan, ankoraŭ en fazo priesplora, vendejon de varoj uzitaj.

En Madrido la fondaĵo *Laboro* disvolvas similajn aktivaĵojn. Ĝi kuraĝigas malgrandajn dungajn inciatojn. Konkrete estas kvin la entreprenoj helpitaj: ASYCO, kiu dungas 6 personojn kiuj sin dediĉas al la flegado hejma de malsanuloj kaj maljunuloj; ECOLASER, kiu dungis 6 personojn plus ekonomian direktiston, kies fako estas la reciklado de kartoĉoj de laserpresilo; ASSICAR, dediĉita al la translokigo de aŭtomobiloj bezonas direktiston kaj tri kontraktitojn deĵorone, kvankam ankoraŭ estas en fazo de komerca disvolviĝo; TALLER 99, elpensita por doni kontinuecon al la procesoj individuaj de sociaj reintegriĝoj, realigas taskojn ŝuoriparajn, industrikonfekciajn kaj ledoprilaborajn, dunginte 10 laboristojn kaj tri monitorojn; kaj GIRO, kooperativo sociekonomia, kiu celas la normaligadon de la vivoj de virinoj senstrukturigitaj.

Ankaŭ estas tre novaĵokrea tio, kion oni estas farante en la diocezo de Palmo de Majorko, danke al la fondaĵo Deixalles, kiu celas la reintegriĝon socilaboran de homoj kun marĝenigaj problemoj, farante ĉitaskon per aktivadoj reciklaj. Tiel, ne nur ĝi kontraŭstaras la malriĉecon kaj marĝenigon, sed krome ĝi estigas sintenojn medirespektajn.

Ekzistas kabineto laबororientiga kiu informas pri la eblecoj trovi laborpostenon rilatan al la aktivaĵoj de la fondaĵo kaj disvolvi funkciojn socie utilajn por kelkaj entreprenoj. Multnombraj iniciatoj devenis de la kabineto. ECOPLANTON konsistigis 3 personoj kiuj vendas plantojn, florojn kaj agrokulturaĵojn plurajn; *Quita y pon verde*n konsistigis 2 personoj kiuj komercigas uzitajn vestaĵojn; *Exodistribuciones*-on konsistigis 2 personoj kiuj disvendas reciklitajn paperaĵojn; *Finca Ecológica* estas kooperativo kiun konsistigas 3 personoj kaj produktas biologiajn varojn. En fazo de projekto troviĝas presejo uzonta reciklitan paperon, kaj ankaŭ, entrepreno dediĉonta al la reciklado de kartoĉoj toner-aj (laserpresilaj).

Aliajn iniciatojn sekvantajn la saman agadlinion oni disvolvas en Valencio, Plasencio, Zaragozo, Tenerifo kaj Barbastro. Ĉiuj el ili kunhavas la trajton bezoni simplajn taskojn, amasojn investojn pri laborforto, kaj malaltan formadnivelon de la laboristoj. Ĉiuj ĉi spertoj pruvas, ke *la popolo kapablas revigliĝi kaj sencigi sian ekziston forigante la sentaŭgecan kaj senpotencan sentojn suferatajn de ili kiam ili estas sendungaj.* Oni povas pli rekte diri, ke tio, kion atingas la profititoj de tiuj ĉi programoj estas regula gajno pere de siaj propraj penoj, kialo por ĉiutage leviĝi el la lito, kaj la ŝanco aranĝi sian vivon kaj konstrui sian propran estont-projekton.

La solvetoj ĉispecaj donas respondojn realajn, vivipovajn kaj esperigajn. Tamen, la solvo por la sendungeca problemaro ne povas plene deveni de bonfara organizaĵo, eĉ ne de parto organizita el la civitanaro, sed ĝi bezonas ĉies partoprenon. Oni redistribuu la riĉecon pere de la laboro.

Tial, Karitaso ankaŭ apogas la proponojn kies celoj estas efika redistribuado de la riĉeco pere de la laboro, kaj la atingon de nova socia kontrakto fundamentita sur la dungokrea rolo.

Aganzo opinias, ke la minimuma rento ganrantiota por ĉiuj civitanoj, la redukto de la deĵordaŭro, kaj la publika subteno al aktivaĵoj socie kaj komunume utilaj estas grandaj defioj kiujn la tuta socio devas alpreni, se ĝi deziras eviti la marĝenigon kaj dupolusiĝon. La kohereco socia kaj la indeco de milionoj da personoj dependas de ĉio ĵusmenciita. Por solvi tiujn ĉi aferojn favore al la viroj kaj virinoj, anstataŭ favore al la ekonomio kaj financa sistemoj, necesas multaj manoj.

*Pablo Ruiz (H.O.A.C[4])*

NOTOJ.-

[1]Esperantigo de la nomo *Cáritas*, kiu estas katolika bonfara organiza[illegible]o

[2]Perioda asembleo decida de la hispanaj katolikaj episkopoj.

[3]Teritorio kie epistkopo katolika rajtas ekzerci sian religian aýtoritaton.

[4]Hispana mallongigo de Katolika Kunfrataro por Laborista Agado.



# *Kio estas vegetarismo?*


La vegetarismo, t.e., vivado per la produktaĵoj de larego kreskaĵa kun escepto de ĉiuj



manĝoj, akirataj per difektado aŭ detruado de besta vivo, ricevas en la lasta tempo ĉiam pli da partianoj. En Londono sin trovas jam ĉirkaŭ 40 restoracioj, en kiuj oni donas nur manĝon kreskaĵan kaj kie ĉiutage ĉirkaŭ 30000 personoj akceptas malkaran kaj fortigan tagmanĝon. En Berlino en Januaro de 1893 jam ankaŭ ekzistis ĉirkaŭ 20 restoracioj, kaj en ĉiuj pli grandaj urboj de Anglujo, Ameriko kaj Germanujo ekzistas por personoj solestarantaj la okazo vivi vegetare, ne parolante pri la multegaj, distritaj en la tuta mondo familioj, kiuj elstrekis la viandon el sia tabelo de manĝoj. Granda nombro da societoj kaj gazetoj penas konatigi kun la afero de sensanga nutriĝado pli grandajn rondojn da hmoj, kaj tiuj ĉi penoj estas forte subtenataj de la ĉiam pli vastiĝanta sen medikamenta kuracado de malsanoj aŭ la sistemoj naturkuracaj de diversaj direktoj, kuj preskaŭ ĉiuj faris el la forĵeto de manĝado de viando la unuan kondiĉon ĉe siaj malsanuloj. Estus tial utile esplori pli proksime la motivojn de la vegetarismo. Ni vidas, ke ĉe ĉiu viva estaĵo de la plej malgranda fungo ĝis la plej disvolvita besto laktosuĉanta, la partoj de la korpo, kiuj estas difinitaj por la nutro, estas tut precize aranĝitaj por la prilaborado de la respondaj manĝoj: la dentoj, stomako, intestaro de la viandomanĝanta leono estas esence malegalaj je la samaj organoj de la kreskaĥomanĝanta elefanto, de la ĉiomanĝanta urso aŭ de la insektomanĝantaj birdoj. Ne povas esti alie ankaŭ kun la homo, ku laŭ la aranĝo de sia korpo havas la plej grandan similecon je la fruktomanĝanta simio kaj sekve jam laŭ sia deveno devus ankaŭ esti fruktomanĝanto. Ni vidas tamen, ke la nuntempa kultura homo kontraŭe preskaŭ nur en esceptaj okazoj vivas de fruktoj kaj ordinare uzas manĝon miksitan, konsistantan el viando kaj kreskaĵoj, kaj tamen povas vivi kaj ĝis certa grado esti sana. Sed tio ĉi montras nur, ke la naturo zorgis pri tio, ke ne tuj pereu ĉiu ekzistaĵo, kiu vivas ne precize laŭ ĝiaj reguloj. Sed difekto longe ne povas forresti, kaj ĉiam la pli grandiĝanta malsanemeco kaj korpa degenerado de nia gento, kiu parte certe dependas ankaŭ de aliaj malĝustaj kondiĉoj de vivo, montras kun timiga klareco, ke la miksita manĝo tamen ne povas esti la ĝusta. Kio do estas pli proksima, ol la reiro al la maniero de vivado, dezirita de la naturo, t.e. al la vegetarismo? Preskaŭ ĉiuj buĉataj bestoj estas malsanaj, la grasigado estas fondita sur agado malsaniga (manko de sango kaj grasa degenero), la viando sekve estas preskaŭ ĉiam malsana kaj malbonigita; krom tio komenciĝas sia putrado, kiam la vivo forlasis la korpon. La homo kultura sekve en efektivo nutras sin per mortintaĵo. Dume la manĝaĵo de la vegetarano estas ankoraŭ plena de vivo. Se oni fruktojn kaj grenon elmetas al respondaj influoj, tiam nova vivo naskiĝas el ili. Kaj al ni ŝajnas, ke por la konservado de nia vivo, la plej bone taŭgas nur tia manĝo, en kiu ne mortis ankoraŭ la ĝermo de vivo. Nur tiam, kiam fruktoj kaj greno fariĝas putraj, ili trovas sin en tia stato, en kia la viando sin trovas jam tuj post la buĉo! Ĉu estas tial miro, ke la gazetoj konstante alportas sciigojn pri veneniĝo de viando, kiu sekvigas aŭ malfacilajn malsanojn, aŭ la morton?! Kontraŭe, ĉe manĝo kreskaĵa tiu ĉi danĝero estas preskaŭ absolute esceptita, kaj se



nur la ceteraj kondiĉoj de la vivo estas iom konformaj al la naturo, la



vegetarano ĝuas pli bonan sanon, ne estas tiel forte elmetita al malsanoj aŭ elportas tiujn ĉi multe plibone, ol la viandomanĝanto. Nemezurebla estus la rekompenco, se manĝo kreskaĵa okupus la lokon de viando. Nun la vilaĝano estas sklavo de sia bruto. La dekono de la nun bezonata tero estus sufiĉa por la nutrado de lia familio, se li plantus sur ĝi fruktojn kaj legomojn. Al tio ĉi la laborado estus pli pura, pli facila kaj pli interesa, ol ĉe la malnova mastrumado bruta kaj kampa, kie la plejmulto da laboro devas esti uzata por produktado de manĝo por la bruto. Kun plantado de fruktoj ankaŭ la homo klera volonte sin okupados, ĉar ĝi postulas lian tutan spiriton, lasas lin ĉiam pensi pri la estonteco kaj per la originaleco de la laboroj ligas la printempon kun la aŭtuno, la someron kun la vintro kaj en tia maniero faras el lia agado ĉiam laboron sub espero. Tutan homan vivon, eĉ centjarojn dauras la fruktoj de laborado de fruktoplantisto, kaj ofte nur la infanoj atingas plenan ĝuon de la plantoj, kiujn iliaj patroj faris. Nenie la nun tiel ofta, nur por la momento kalkulita kaj sekve nemorala raba prilaborado havas pli malmulte lokon, ol ĉe plantado de fruktoj. Tial la fruktoplantado devas influi noblige sur tiuj, kiuj sin okupas je ĝi. Pli grandaj ankoraŭ estas la moralaj rezultatoj de la forĵetado de manĝo vianda, kiu estas ja la unua kondiĉo por la disvolviĝo de la plantado de fruktoj kaj legomoj, dank' al la per tio ĉi forte pligrandigita bezono de nutraĵo kreskaĵa. La akirado de viando estas neebla sen barbareco; ĝi povas esti farata nur per mortigado de vivaj, sentantaj ekzistaĵoj, kiuj estis kreitaj por vivo, ne por morto. En ĉiu senpartia, sentanta homo vivas abomeno al detruado de vivo, kaj nur la kutimo povas silentigi la internan voĉon, kiu krias al ni: *ne mortigu!* Multaj tabloj restus sen viando, se la mastrino de la domo devus mem mortigi barbare la beston. En neklara konscio de la nemoraleco de la buĉado oni ja sen tio forpelis jam en malproksimigitajn buĉejojn la scenojn de mortigado de bestoj, kiuj ne estas eblaj sen fluoj de sango, sen kompatinda kriado kaj agonio de la mortantaj bestoj, sen sangitaj vestoj kaj manoj de la buĉistoj. Riveroj da sango, kriado de mortantoj, odoro de putrado —kia kontrasto al la korĝojiga vio kaj bonodoro de ŝarĝita fruktarbo aŭ de pure aranĝitaj magazenoj de fruktoj! La ankoraŭ ne malbonigita instinkto de la infanoj ne dubas, kion ĝi devas elekti —sangan cifonon de mortinta besta korpo aŭ ridantan pomon, bongustan vinberon. Per la ĉeso de grasigado kaj buĉado tiel delikatiĝo de moroj estus necesa sekvo de la vastiĝo de la vegetarismo. Ke la bestoj nin manĝus, se ni ilin ne manĝus (la ordinara rediro de nevegetaranoj), ni ne devas timi; oni ja nur ekmemoru la grandan penon, kiun la brutedukisto havas kun la edukado de buĉaj bestoj. Baldaŭ ekzistus nenia bruto, se neniu plu zorgus pri tio ĉi. Kaj la laborado de la bestoj ja sen tio ĉiam pli kaj pli estas anstataŭata de forto de maŝinoj, kaj anstataŭ la buĉado la homoj baldaŭ fordonus sin al la pli sana profesio de ĝardenisto, kiam ili vidus, ke tio ĉi donas pli grandan profiton, Ke la homo tre bone povas ekzisti kaj esti tre forta de manĝo kreskaĵa, eĉ se ĝi estas kunmetita tre unuforme, tion ĉi pruvas la milionoj da vilaĝanoj, kiuj nur malofte ricevas sur sian tablon peceton da viando kaj el kies mezo ja ĉiam nova freŝa sango venas en la malsanemajn, sangomankajn familiojn de la urbo. La vilaĝanoj sekve senkonscie estas praktitkaj vegetaranoj. Sed kiel riĉe oni povas kunmeti sian tabelon de manĝoj, oni vidas el la sekvanta tabelo de kreskaĵaj nutraĵoj, kiuj per riĉeco de sia enhavo ne lasas ion por deziri: (1) **Fruktoj**: kun kernoj, kun ostetoj, kun ŝeloj, nuksoj, eroj, sudaj

fruktoj; fruktaĵoj, kiel ekzemple fruktoj sekigitaj, fruktaj gelatenoj, marmeladoj, konfitaĵoj, fruktaj sukoj; oleo de olivo, de nuksoj, de migdaloj, butero de kokosoj. (2) **Grenoj**: tritiko, sekalo, hordeo, aveno, rizo, maizo, poligono, spelto, milio, ktp., en iliaj prilaboraĵoj en formo de faruno, grio, makaronoj, vermiĉeloj, pano, bakaĵo kaj farunaĵo de diversaj specoj. (3) **Fruktoj ŝeletaj**: faboj, pizoj, lentoj, kiel ankaŭ la faruno el ili. (4) **Legomoj**: radikaj, foliaj, trunketaj, floraj kaj fruktaj; fungoj, salatoj kaj supaj herboj. Fine oni devas ankoraŭ montri, ke la kuirejo de vegetaranino estas esence pli simpla, ol la kuirejo vianda. En ĉiuj tempoj memstaraj pensantoj levadis sian voĉon kontraŭ la mortigado de bestoj por la celoj de nia nutrado; eĉ tutaj popoloj, kiel ekzemple la pli altaj kastoj de la hindoj-budistoj, uzas pro motivoj religiaj nur manĝon kreskaĵan. Ke por la sindefendo la mortigo de al ni malutila besto estas permesata, eĉ ŝuldo, tion ankaŭ la vegetarano ne neas; en tiaj okazoj estaĵo pli malalta devas cedi al estaĵo pli alte organizita. Ni devus tro multe paroli, se ni volus priskribi pli detale la ĉiuflankan efikadon de la vegetarismo. Ni devas nin kontentigi je la supre donitaj mallongaj rimarkoj kaj sendi la dezirantojn al la tre riĉa literaturo, kiu aperis rilate tiun ĉi objekton. Kiu deziras ekkoni la objekton pli proksime tiu povas venigi per la librejo la katalogon de Max Breitkreuz en Berlino, de Theod. Grieben (L. Fernau) en Lejpcigo, de Hartung et Sohn en Rudolstatt, aŭ li turnu sin al ia el la kluboj vegetaranaj, kiuj ekzistas en ĉiuj pli grandaj urboj.



*L.L. Zamenhof*

Venas el paĝo 14 ilin sentrudeme. Bonaj ideoj estas defendindaj, sed neniam trudendaj. Esperanto ne estas religia fido, nek futbala teamo, kaj tial oni ne devas serĉi *konvertitaj* aŭ sampartiuloj senkondiĉaj. Se morgaŭ eksestus alia idiomo aŭ procedo pli rapida aŭ efika por atingi universalan komunikadon, mia konsilo estus adopti ĝin, kaj mi mem enkapiĝus la migradon. (Tiu ĉi okazis ekzakte la lastan jarcenton, kiam la istoj pri Volapük trovis Esperanton: ili ĉiuj adoptis Esperanton, kaj sia revuon iĝis la unuan esperantan magazinon!)

Krome, Esperanto ne estas perfekta lingvo, ja. Sed ĝi estas la malplej malbona solvo kiu estas ĝis hodiaŭ por superi lingvaj kaj kulturaj baroj. Mi opinias, ke en la ostempo ne malproksima, kiam la dorlotita kaj ĥimera plurilingvismo eŭropa (tio estas: ke ĉiuj lernas ĉies lingvojn, entute 15 lingvojn ) bankrotos, je la ekonomia signifo de la vorto (kiam nur estis 9 lingvoj, 350.0001000.000 pesetojn oni enspezis JARE en interpreto kaj traduko en la Eŭropa Parlamento), kiam tio okazos, la solaj solvoj restantaj estos du:

1 Hegemonio de nur unu lingvo (angla, franca aŭ, plej verŝajne, germana), aŭ

2 Adopto de Esperanto, malgraŭ politikistoj.

La resto de la mondo jam donis ekzemploj Eŭropon pri tio: Svahilo estas ponta lingvo en Orienta Afriko, kaj tuta Azio legas kaj komprenas ĥinajn karakterojn. Kiam Eŭropo adoptos Esperanton, la amerikaj eŭropanoj sekvos la saman vojon.

*Daŭrigota de Olga López*

# Eseo monatotria:

## Defendo de la esprima kaj opinia liberoj

Revuo kiu ne estigas polemikojn estas sankta, sed ne laika.

En la ĵusa historio de Hispanio estis diktaturo kaj, samkiel agas ĉiu konservativa diktaturo, estis malpermesata la esprimlibero kaj tial, la maldekstrularo ne havis la ŝancon alparoli la popolon egalkondiĉe, kaj atingi la povon.

Finiĝinte la diktaturo kaj restarigita la burĝa liberala demokratio, la maldesktrularo kontraŭstarinte la diktaturon prezentiĝis kiel *la luktantoj por liberoj*.

Dudek jarojn post la restarigo de la demokratio, la realo estas tre malsama, la maldekstrularo montriĝis publike kaj estris la nacion dum 13 jaroj, kaj ankaŭ eĉ ĝi estiĝis malamiko de la libereco. Sufiĉas du ekzemploj por ĝin pruvi.

### *La afero Quintana (kintana).*

D-ro Quintana estas katedrulo pri psikologio kaj verkis libron enhavantan la opinion, ke ĉiuj homoj estas egalaj pro sia kondiĉo de personoj, tamen la personeco estas tute alia afero, ĝi estas socia produkto.

Tiu ĉi universitata profesoro konkludis, ke la personeco de la blankuloj estas supera ĉar socie ili estis kreintaj kondiĉojn kiuj igis ilin superaj rilate la nigrulojn kaj la flavulojn.

*Se la personeco estas socia produkto, oni povas diri ke la blankuloj strebas al, aŭ ke la nigruloj emas al..., aŭ ke la flavuloj strebas al...* Jen la mesaĝo de la verko de S-ro Quintana.

Aparte de tiuj ĉi ideoj oni povas sin demandi pri la konsisto de la supereco. Ĉu ĝi estas abstrakta inteligenteco? Ĉu ĝi estas agiva inteligenteco? Ĉu temas pri emocia inteligenteco?

Oni povas konsenti aŭ malkonsenti rilate la intelektan proponon de profesoro Quintana, sed ja ĉiu ajn intelekta propono devas esti kontraŭargumentata pere de ideoj, de pruvoj, de enketoj, de argumentoj aŭtoritataj, ktp.

Diskonigitaj tiuj ĉi premisoj, mi diras, ke la maldekstrularo hispana ne estas kontraŭstarigintaj la proponojn de S-ro Quintana per argumentoj, kun dialektiko de ideoj, sed per premoj kaj ĉantaĝoj. Tio estas, ke la maldekstruloj kiuj defendis antaŭ 20 jaroj la esprimliberon nun agas kvazaŭ la inkvizicio de la Aŭtriasoj. Nu, ne okazis bruligo de libroj de profesoro Quintana, sed oni devigis lin ekstermerkatigi la eldonon. S-ro Quintana ne estas bruligita kiel heresiulo, same kiel ni kutimis dum la reĝado de Karolo la Dua *la Ensorĉigito*, sed oni estas preminta lin por ke li eksiĝu de la instrua kariero.

Neniu intelekta argumento estas prononcita de la maldekstrularo kontraŭ la tezo de sinjoro Quintana sed, aliflanke oni estas preminta lin, insultante kaj preskaŭ minacante tiun profesoron.

Jen bedaŭrinda spektaklo kaj ankaŭ bedaŭrinda inkvizicieska praktiko flanke de tiu maldekstrularo. Sed la spektakloj ne finis ĉi tie.

### *La Afero de Kastilo-Manĉo.*

Kelkajn tagojn poste la ĵurnaloj publikis la jenan noticon: *Profesorino estas forpelita de la Universitato de Kastilo-Manĉo pro sia rifuzo rubriki manifeston favore al Felipe González*. La novaĵo ne estas denuncio farita de la profesorino, sed la sentenco de la Supera Justica Tribunalo de Kastilo-Manĉo praviganta tiun profesorinon.

Jen ŝanco por defendi la rajton ne rubriki manifeston kaj defendi la konsciencan liberecon, sed la maldekstrularo preferis silenti, kaj ŝajni neinformita.

Ĉu ili volis la esprimliberon tiucele? Ŝajnas al mi, ke la esprimlibero superas la sintenon de la hispana maldesktrularo. Tiuj ĉi faktoj konjektigas min la jenojn:

1e. -Ke la intelekta nivelo de la maldekstrularo hispana estas malalta ĉar ne esti respondinta intelekte al la propono de sinjoro Quintana signifas, ke ĝi ne havas argumentojn kaj tial estiĝis la premoj kaj insultoj.

2e.- Neniu partio aŭ ideologio povas defendi la publikajn liberecojn se ĝi ne havas intiman konvinkon pri la neceso praktiki tiujn liberecojn por eviti la starigon de totalismaj reĝimoj.

3e.- La maldekstrularo ĝenerale konas tre bone la ekziston de totalismaj reĝimoj ĉar dum multaj jaroj ĝi estris, uzante tian politikan organizan sistemon, la duonon da Eŭropo, kaj en la hispana kazo, en kelkaj lokoj, dum la civila milito, tial la liberala fluo havas malmultan gravecon por maldekstrularo fundamentita intelekte sur totalismaj aj aŭtoritarismaj skizoj.

4e.- Ene de la maldekstrularo oni devas rimarkigi la eksceptom de la anarĥiistoj, ĉar ili ankoraŭ ne estas havintaj longdaŭran sperton pri ekzerco de la politika povo; oni ne scias ĉu la anarĥiismo, en sia praktiko, kondutas totale same kiel la maldesktrularo socialisma (en kiun mi inludas la socialistojn, komunistojn, ktp).


5e.- Ne defendi la rajton erari de sinjoro Quintana, aŭ la rajton ne rubriki manifeston apoge al sinjoro González signifas, ke iun tagon vi, kara leganto, aŭ mi, verkanto, povas suferi proceson inkvizicieskan flanke de la totalisma maldesktrularo, aŭ dekstrularon, en niaj vivoj.

Fine, mi ne volas ne mencii la inkvizicieskan modon deveninta el Usono kaj konatan kiel *la korekto politika*. Se triumfus tiu ĉi elekto, post kelkaj jaroj ni devus paroli, pensi kaj vesti samforme, manĝi aŭ trinki samforme kelkajn nutraĵojn kaj uzi saman lingvon internacian kaj unuformigan.

Sed tiun ĉi ideojn mi postlasas por aliaj artikoloj atendante la reagojn de la maldesktruloj eŭropaj kaj hispanaj.

*Juan Antonio Cabezos Martínez*

# Novaj leaoj



**Nin atingis novaĵoj pri elstarigo de LEA itala kaj tiu rusa.**

La unuan de februaro 1997, dum la Fonda Konferenco en Moskvo, estis kreita la rusan LEAn sub oficiala nomo *Popola Rusa Esperanto-Movado* (PREM). Kiel aliaj leaoj, PREM havas celojn disvastigi Esperanton en medioj de progresemaj demokratiecaj kaj maldekstrulaj medioj kaj atingadi politikajn decidojn favorajn al la internacia lingvo en la internaciaj, naciaj kaj lokaj instancoj. Oni povas kontakti PREMn pere de Nikolao Gudskov, Vladimir Bespalov kaj Miĥaelo Ĉertilov P.f.57 RU-105318, Moskvo, Rusio, kaj ankaŭ interrete ĉe era@glasnet.ru.

Simile, en januaro fondiĝis la Itala Laborista Esperanto Asocio (ILEA), kies respondeculoj estas Renato Corsetti kaj Giancarlo Rinaldo. Gratulon al ambaŭ asocioj, kaj ni voĉdonas por longdaŭran interlabora agado!

# Ĥo, kia co!

Unue, mi klarigos, ke ne rilatas al mia verkemo, ke oni kritikis mian lastan artikolon pri la kastila-hispana disputo (KelS 32). Personaj aferoj gardis min for mia skribmaŝino, bedaŭrinde. Fakte tiuj kritikoj faritaj de Ŝnajpero kaj Golden tre klarigemas: al Snajpero mi diras, ke mi tute konsentas pri la titolo de sia artikolo. Bedaŭras mi, ke la enhavo ne honoris ĝin, ĉar li ne aldonis eĉ unu argumenton aŭ citaĵon sur kiu lia opinio subtenas, krome de lia persona sinteno de nekastilano. Mi mem ne estas kastilano (eĉ ne hispano mi estas), sed tio ne rilatas al la temo debatita.

Rilate al Golden, mi diras, ke la esperantistigo de sonoj havas tro seriozajn limojn, kaj fakte *lj* anstataŭ *LL* ŝajnas mokon, ĉar LL estas ununura sono same kiel hispana *ch*, dum *lj* estas du sonoj, same kiel esperanta grupo *tŝ* (se iu sukcesas prononci ilin!) Tiurilate, estus certe amuziga klarigo sia pri la esperantistigo de la *kastilia Z*! Mi sincere opinias, ke tiuj *originismaj esperantistigoj* estas ne alio ol kaŝita ŝovinismo. Ni sennaciismaj esperantistoj (ĉu ekzistas aliaj?) zorge legu kion Lanti opiniis pri la afero (por ne mencii Zamenhof mem, kies doktrino pri tio estas ĉe la regulo pri *internaciaj vortoj*), kaj poste ni decidu senakre.

Kaj tiusence mi volas direkti vian atenton al senesperantistigo de esperanta sono kiun, kvankam kiel sudamerikanino mi ne kutime uzas kiam mialingve mi parolas, mi tamen ŝatas: **Ĥo**. Tiun konsonanton multaj esperantistoj ne regas, certe, kaj eble pro tio ni vidas, ke pli kaj pli oni anstataŭas ĝin per k: ne plu *meĥaniko*, ni nun havas *mekaniko*n, ne plu *ĥaosas* ni, sed ni *kaosas*, kaj ankaŭ *koleras* kie antaŭe ni *ĥoleris*, kaj ni ne plu povas viziti tiun mirindan landon, *Ĥinio*, ĉar *Ĉinio* jam anstataŭis ĝin. Feliĉe, nia *koro* garantias, ke ĉiam ni povos kanti *ĥore!* Se ni klopodas trovi nefuŝan instruiston de Esperanto, post paro da minutoj ni povos taŭge prononci la ĥon. Kaj se ni ĉiuj povas prononci la ĥon, kial senesperantistigi ĝin?

La C estas *ĥamaleona problemo*, ĉar neniu antaŭe plendis pri ĝi, laŭ mia kono. Tamen, tre malmulte da personojn mi trovis, kiu bone prononcas ĝin. Se Esperanto estas fonetisma lingvo, la c ne estas du sonoj, sed nur unu. Oni lernas, ke ĝi sonas kiel *ts* en *tso-tso muŝo*, sed tio estas malvera. Ĝi sonas kiel **la unua duono de t** kaj la **dua duono de s**!, sed *ĝi estas nur **unu** sono*. La sekvo de tio estas, ke esperantistoj kiujn mi trovas, diras eĉ ne *stsientso, sed ĉienĉo*, ne *tsimo*, sed *ĉimo*, ne *tselo*, sed ĉelo (se ne ***θ**elo*). Se c estas tiel malfacile lernebla, kial diable ni ne simple forigu ĝin, kaj anstataŭu ĝin per alia sono, kiel ekzemple la kastila c (θ) en *cielo*? Mi ne povas ne kompari tiun malbonon de Esperanto kun tiu alia pri la ĥo. Tie, oni agnoskas la aŭtoritaton de nia majstro, sed praktike emas forgesi ekziston de sono kiun la angloj kaj la francoj (ĉefe) ne regas; ĉi tie oni konstatas, ke tro malmulte da homoj regas la korektan prononcadon, sed neniu anstataŭas la con *grafike,* kvankam *sone* oni aŭdas alian sonon. La sekvo estas, ke la sono ĉo havas du grafismojn: c kaj ĉ.

Sed mi estas pli konservativa ol mi ŝajnas nun: mi ne proponas, ke oni ŝanĝu ion ajn, sed mi petas al miaj kunlingvanoj esperantaj, ke ili klopodu prononci nian lingvon unikan bone, forte, elegante kaj kuraĝe. Regu la con, kaj ne timu la ĥon! Post ĉie, se ni esperantistoj ne regas Esperanton, kiel ni povus malebligi ridon al nia lingvo?

Isabel Acevedo

# Ĉu hispana, aŭ kastila?



Malfacila kaj ĉiam polemika elekto ĝi ĉiam estas. Ambaŭ vortoj estante korektaj kaj akcepteblaj, nur endas decidi kiam kaj kie oni devas uzi ĉiun.

La vorto *hispana* nomas tiun lingvon oficialan kaj plejmultan (laŭ la nombro da siaj parolantoj) en Hispanio, sed ni ne povas nei realon lingvan ekzistante en nia lando: kvar lingvoj kaj kelkaj dialektoj. Kiam oni parolas pri la lingvoj de Hispanio, oni citas la katalunan, la eŭskan, la galegan kaj la kastilan. Kial *kastila* kaj ne *hispana*? La respondo estas simpla: se ni parolus tiuetose pri *hispana* anstataŭ *kastila*, ĝi estus kvazaŭ agnoski, ke la ceteraj lingvoj ne apartenus al nia lingva-kultura kunhavaĵo.

La disvolvo kaj formiĝado de nia lingvo okazis paralele al tiu de la katalana kaj galega, kaj je tiu ekzakta momento, pro historiaj kaŭzoj, oni nomis ĝin *kastila*. Iom post iom, kaj helpita de la malsubiro (forcigita de subpremado) la *malplimultajn* lingvojn, la kastila antaŭeniris kaj ĉefiĝis kiel regan lingvon.

Per malfermo eksteren, per nomiĝo kiel *hispana de Ameriko* kaj per paralelo al aliaj nacioj (se el Francio estas la franca, el Italio estas la itala..., kial ne el Hispanio la hispana?),. nia lingvo nomiĝis plejmulte kaj antaŭ la mondo, la hispana.

Tamen, agnoskendas, ke tio ĉi estas facila por unulingvaj parolantoj, sed dulingvaj parolantoj agnoskas kaj sentas, ke siaj du lingvon apartenas al Hispanio, kaj ke pro respekto kaj toleremo, ni hispanparolantoj devus nomi *kastela* nian lingvon kiam ni renkontas parolantojn de la aliaj tri lingvoj *hispanaj*.

Tre vere estas, ke pri tiu ĉi temo kelkfoje ĉefas rezonoj socipolitikaj antaŭ tiuj lingvaj, kaj ke fanatikismoj troas ĝis uzi lingvan sistemon kiel persvadan metodon; sed endas superiri tiujn cirkonstancojn, agnoskante kaj valorigante nian lingvan riĉecon, ĉar fanatikismoj malofte atingis pozitivon, sed pli ĝuste pecigemon kaj konflikton inter popoloj.

Konklude, mi asertas, ke endas ĝin nomi ni *hispana* rilate al la ekstera mondo, kaj *kastila* rilate la aliajn hispanajn lingvojn.

Nur gardante sintenon tolereman, rispektan kaj fieran (lingva riĉeco de nia lando endas tiel) kaj konscienco kultura ebliĝos, kaj la lando aperos kiel tuto, eblas kunvivi armonie.

*Ángela Soriano Román,*
*Profesorino pri Hispana Filologio.*

# LA TAJFOREGNO DE MURCIA,

## El *Lirikaj perloj de Al-Andalus*,

*de Antonio Marco Botella*



La murciano Safwan Ibn Idris, ankaŭ estas aŭtoro de lirika antologio kaj de verko disvolvanta idearon, kiu emfazas la platonan amon. Li estis disĉiplo de Averoeso kaj Ibn Baŝkuwal. Ibn Idris forpasis en la jaro 1202.

Alia grava poeto de tiu regono estis Abu Muhammad Abd al-Yalil ibn Wahbun, nomata *la murciano*. Iam li verkis poemon dediĉitan al la Sevila reĝo Mutamid, kiun li laŭdis per jenaj versoj:

*Fak' similas tranĉan sabron*
*en la lerta mano via.*
*Ho, se havus sabr' animon,*
*kiam la batalo viglas!*
*Kvazaŭ ŝalo la kapuĉo*
*super falko-kap' kaŝita*
*kovras la okulojn durajn;*
*kiam ĝi libere flugas*
*la ĉielojn vunde ŝiras,*
*falko estas rabobirdo*
*kun okuloj incendiaj.*
*Fugas ĝi kun la impeto*
*de la vento plej rapida.*
*Oni dirus ke la falko*
*estas fil' de vent' senbrida!*



Abd al.Yalil ibn Wahbun forpasis en la jaro 1087.

Plia poeto naskiĝinta kaj loĝinta en Murcio estis Abu 'Ubada al-Walid ibn Ubayd Allah, nomata *Al Buthturi* de Al-Andalus, aŭtoro de filozofiecaj poemoj, jen unu el ili:


*Antaŭ miaj kunmanĝant*
*mi emfazis senmezure*
*mian plendon al la faro*
*pri botelo pervelure*
*vestita per nigra masko:*

*ĝi devis montri plezure*
*la vinsunon en lumklaroj,*
*sed ĝin faris nigrobskure...*
*Botelo, kies koloro*
*lumon baras al la vino,*
*similas envian koron*
*spitantan sian destinon,* ktp.

Yahya ibn Muybar forpasis en la jaro 1192.

Elstaras ankaŭ la poeto Abu Hasan Yafar ibn al-Hayy, naskiĝinta en Lorko en la 12a jc. Li diris per bonaj versoj:

*Donis mi al vi ĉi-pomojn*
*sen emfaz' aŭ laŭdo-ŝparoj,*
*kun sentemo malavara,*
*kaj sincera korspontano.*
*Temis pri amiko-vangoj,*
*kiuj al mi tuj revenos*
*per la flu' de plena amo.*
*Tiuj ruĝkoloraj pomoj*
*hont-ruĝigis pro la flamo,*
*kiam ili renkontiĝis*
*kun amoro sen vualo,*
*pro doloro de l' disigo*
*ja paliĝis viaj vangoj!*



# Kajeroj el la Sudo

BULTENO DE HISPANA ASOCIO DE LABORISTOJ ESPERANTISTAJ (HALE)



REDAKCIO: **Poŝtkesto 4461, E30080 MURCIA, HISPANIO**

**Retskribu al jesuo@mur.hnet.es**

**http://www.mur.hnet.es/uphm/jesuo/kajeroj.htm**

**http://www.dragonfire.net/~Esperanto/kajeroj.htm**





**Aktoroj ankaŭ laboristas**

## *Proponoj farotaj de la Sekretario de HALE al la venonta kongreso en Valensjo la 8-an de julio 1997.*

1e Por eviti estontajn konfliktojn inter la HALEanoj kaj neŭtralaj movadanoj de HEF, mi proponas ke de nun la Ĝeneralaj Asembleoj de HALE nepre malkoincidu kun la kunvenoj aŭ kongresoj de HEF, kaj sekve ke oni serioze esploru la eblecojn aranĝi ilin kadre de, ekzemple, sindikataj aranĝoj, alternativaj foiroj, ktp. Tio estas, en plene kompromititaj progesemaj etosoj.

2e Oni klarigu la jenajn aferojn:

a) Kiel oni devas difini la vorton *progresema*, kiu insiste aperas en la Statuto de HALE?

b) Ĉu oni adoptu kiel celon de HALE, imite al SAT, uzi Esperanton kiel ilon por la liberigo de la laboristaro, aŭ oni preferas, ke HALE plu vegetu kiel nekompromitita iel kultura asocio kies ĉefa celo estas la interamikiĝo?

3e Formuli konkretajn iniciatojn pridebatendajn cele al la estigo de daŭraj kunlaboroj kun sindikatoj kaj progresemaj fortoj pri sociaj programoj.


Depósito legal: Z-2398-88

Presejo: Ĝojo